# EL POPOLA ĈINIO

中国报道

3

1975





Novicoj (*ĉinstila pentraĵo*)

de **Gaŭ Zong** kaj **Dong Liang**

# Eduka Revolucio en Pekina Universitato


EN la socialisma Ĉinio laboristaro kaj aliaj laborantaj popolanoj ne nur devas ĝui privilegion en ricevo de eduko sed ankaŭ devas teni edukan aferon en siaj manoj por ke ĝi konformiĝu al la socialisma ekonomia bazo kaj fariĝu ilo de la proleta diktaturo. Tio estas la celo de la proleta eduka revolucio iranta en Ĉinio. Nun la revolucio jam akiris ĝojindan sukceson. En tiu revolucio profunda ŝanĝiĝo okazas al la Pekina Universitato, unu el la plej malnovaj altlernejoj de Ĉinio.

## REVOLUCIO DEVAS ESTI FARITA EN EDUKADO

La Pekina Universitato fondita en la jaro 1898 estas sinteza altlernejo kun socisciencaj kaj natursciencaj fakoj. En la duonkolonia kaj duonfeŭda malnova Ĉinio altlernejoj kiel la Pekina Universitato senescepte servis kiel ilo de imperiistoj, feŭda bienularo kaj burokrata burĝaro por efektivigi kulturan diktaturon super la laborantaj popolanoj, dum la lastaj estis senigitaj je rajto de ricevo de eduko.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Prezidanto Maŭ Zedong donis multajn instrukciojn pri reformo al eduka afero de malnovaj lernejoj. En 1958, laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"Eduko devas nepre servi al la proleta politiko kaj nepre kombiniĝi kun produkta laboro"**, la instruistoj kaj studentoj de la Pekina Universitato levis edukan revolucion. Tamen ĝis la granda kultura revolucio la gvidanteco en la ĉina eduka fronto estis uzurpita de Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj, kiuj senŝanĝe transprenis edukajn sistemojn de kapitalismaj landoj aŭ Sovetunio kaj antaŭenpuŝis per tio reviziisman linion en eduka rondo. Kelkaj reformoj pri instruado faritaj en la Pekina Universitato renkontis subpremadon kaj detruon de la potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon. Tiam profesoroj administris la universitaton kaj burĝaraj intelektuloj regis ĉion. Ili inokulis al studentoj penson pri ĉaso de famiĝo kaj specialistiĝo kaj oponis ke studentoj iru la vojon kombini sin kun laboristoj kaj kamparanoj. La studentoj legadis nur en fermitaj ĉambroj kaj malofte kontaktis la socion. Post diplomiĝo ili ne povis solvi praktikajn problemojn en industria kaj agrikultura produktado kaj ilia sentimento tute ne akordiĝis kun tiu de la laboristoj kaj kamparanoj.

Menciante seriozajn problemojn ekzistantajn en la eduka fronto Prezidanto Maŭ Zedong akre montris: **"La lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado kaj la fenomeno ke burĝaj intelektuloj regas niajn lernejojn nepre ne devas esti daŭrigata."** Ĝuste en la kultura kaj eduka kampo unue komenciĝis la Gran-



*Laboristo-instruisto de la fizika fakultato en lekciado*

da Proleta Kultura Revolucio de Ĉinio, en kiu la eduka revolucio de la Pekina Universitato spertis akran batalon kaj akiris la hodiaŭan venkon.

## GVIDADO DE LA LABORISTA KLASO

Por fari la edukan revolucion, la proletaro nepre devas kapti gvidantecon en sia mano, kaj nur tiel oni povas kulturi studentojn servantajn al la proletaro.

Post kiam la flamoj de la granda kultura revolucio disvastiĝis al la Pekina Universitato, tie disvolviĝis intensa batalo inter proletaro kaj burĝaro por gvidanteco. Ĝuste tiam Prezidanto Maŭ alvokis: **"La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion."** Post tio Laborista Propaganda Taĉmento konsistanta el industriaj laboristoj kaj Propaganda Taĉmento de ĈPLA eniris en la universitaton, tiel ke diversaj organizoj de la universitato sin metis sub la gvidadon de la taĉmentoj. Samtempe tiaj taĉmentoj ankaŭ eniris en multajn lernejojn de la tuta lando kaj ekde tiam la ĉina laborista klaso kaptis la gvidantecon de eduko kaj kreis novan situacion reformi malnovajn lernejojn laŭ la fizionomio de la proletaro.

La eduka revolucio nun iranta en Ĉinio koncernas reformojn al tempo, objektoj, materialoj, metodoj de lernado. En la Pekina Universitato, kiun regis la burĝaro dum la pasintaj kelkdek jaroj, oni ne povus konduki ĝisfine tiel vastan kaj kompletan reformon, se oni sin apogus nur sur la antaŭaj intelektuloj, ĉar ili estas longtempe influitaj kaj venenitaj de eduka penso de burĝaro kaj kutimas iri malnovan vojon.

Tio postulas ke la laborista klaso tenu la direkton por ke la eduka revolucio ne pereu duonvoje.

Foje, iu praktika taĉmento por eduka revolucio de la fakultato de orientaj lingvoj de la universitato iris al kultivejo por tie fari studon. Tamen respondeculo de tiu

taĉmento atentis inokuli al la studentoj nur sciojn de malnovaj libroj, ne lasante ilin tuŝi tiean vivon kaj batalon. Tion rimarkinte la propaganda taĉmento mobilizis instruistojn kaj studentojn por kritiki reviziisman edukan linion kaj varme helpis tiun respondeculon levi politikan konscion kaj per tio ĝustigis la direkton de tiu praktika taĉmento.

Nun en diversnivelaj gvidaj organoj de la Pekina Universitato laboras membroj de la Laborista Propaganda Taĉmento, kion oni nomas "miksi sablojn en teron". En tiuj organoj ili plene ludas gvidan rolon en politiko kaj plifortigas politikan edukon al instruistoj kaj studentoj, kiuj sub ilia gvidado lernas Marksismon, Leninismon kaj Maŭzedongpenson kaj senĉese kritikas ideologion de burĝaro kaj ĉiuj aliaj ekspluataj klasoj. Dank' al tio stariĝis iom post iom marksisma teoria trupo kaj formiĝis klasa supereco de la proletaro en la universitato.

Sub la unueca gvido de la partia komitato de la universitato, la propaganda taĉmento serioze plenumas politikon de la Partio pri unuiĝo, eduko kaj reformo al intelektuloj, unuigas ĉiujn unuigeblajn fortojn por organizi grandan armeon de la eduka revolucio. Dank' al pacienca helpo kaj kuraĝigo de la partia komitato de la universitato kaj la propaganda taĉmento, maljuna profesoro de la filozofia fakultato Feng Joŭlan rekonis siajn pasintajn erarojn en propagando de ideismo kaj kultado al Konfucio kaj ludis rolon en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj en la eduka revolucio. Por esprimi sian dankemon li verkis poemon en 1974:

*Kiel kultant' de Konfucio en la pasinteco,*
*Sekvemas mi nun la amason de la laborantoj:*
*L' eraron mi korekti povas en la maljuneco,*
*Tion sincere ŝuldas mi al granda la Gvidanto.*

## STUDENTOJ EL LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ

Kiajn studentojn oni devas varbi kaj kulturi, tio koncernas la problemon al kiu




*Studentino de la fakultato de ĉina literaturo legas sian verkon al maljunaj kamparanoj.*

klaso lernejo servu kaj por kiu klaso ĝi kulturu daŭrigantojn. Antaŭ la granda kultura revolucio altlernejoj varbis studentojn rekte el abiturientoj. Tiaj studentoj en tempodaŭro de 16-17 jaroj de elementa lernejo ĝis altlernejo ne havis ŝancon kontaktiĝi kun laboristoj kaj kamparanoj kaj ricevis burĝan edukon en lernejoj, kaj pro tio ili kredis ofte nur sciojn en libroj, apartigis la lernitan teorion de praktiko kaj malestimis fizikan laboron kaj laborantajn popolanojn. En la kultura revolucio ĉiuj altlernejoj de Ĉinio reformis tiun varban sistemon.

En 1970 la Pekina Universitato jam komencis varbi studentojn el junaj laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj havantaj praktikajn spertojn. Tiuj junuloj sin hardis minimume du jarojn en popolkomunumoj, fabrikoj kaj trupoj de ĈPLA post diplomiĝo en mezlernejoj. Post kiam ili petis por viziti altlernejon, la amasoj de produktaj grupoj, fabrikoj kaj trupoj, kie ili sin hardas, faris seriozan diskutadon kaj rekomendis tiujn kiujn ili opiniis elstaraj en laborado kaj lernado kaj havantaj socialisman konscion. Sankciite de koncernaj gvidaj institucioj kaj trapasinte finan kontrolon de la lernejo ili povas esti studentoj. Laŭ la bezono de la ŝtato la Pekina Universitato varbis ankaŭ nombron da spertoriĉaj laboristoj, malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj.

Studentoj, kiuj laboris antaŭe kiel laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, tenas striktan rilaton kun la amasoj kaj konas ilian postulon kaj pro tio ili havas relative klaran direkton en servado al la lastaj. Multaj studentoj de la universitato firme memoras la konfidon de la klaso kaj diligente lernas kulturan kaj sciencan sciojn. Kamparana studento Laj Difu de la biologia fakultato ĉiam tenas en sia koro la urĝan postulon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj prenis preventon kaj ekstermon de *Heliothis armigera* kiel temon de sia diplomiĝa praktiko. En kotona kampo de komunumo li atente observis kaj trovis, malgraŭ bruliga suno aŭ torenta pluvo, generan kaj kreskan leĝon de la insekto ne registritan en libroj kaj elmetis metodojn pri ekstermo de la insekto antaŭ ol ĝi kaŭzos



*Studentoj de la matematika kaj meĥanika fakultato faras sciencan esploron per la elektrona komputero kun milionoj da fojoj po sekundo.*

damaĝon al la kampo. Pro tio li ricevis laŭdon de la kamparanoj.

Ĉar la studentoj partoprenis en produktado jam kelkajn jarojn antaŭ sia alveno al la universitato kaj havis certajn praktikajn spertojn, ili povas plifacile kompreni kaj posedi fakajn teoriojn kaj bone uzi ilin por solvi praktikajn problemojn. Studento Guo Guanghin de la filozofia fakultato vizitis antaŭe nur elementan lernejon kaj laboris kiel muldisto jam 18 jarojn. Tute malsame al la studentoj de tiu fako en la malnova universitato, kiuj lernis nur filozofian koncepton sur libroj, li tamen konis kontraŭstaron inter la du linioj en filozofio lige kun sia praktiko de klasa batalo kaj produkta batalo, kaj per tio esploris kaj analizis filozofiajn problemojn. En tri jaroj li skribis multajn notojn pri librolegado kaj kritikajn artikolojn kun klara starpunkto kaj granda batalforto.

La laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj estas vivaj fortoj de la eduka revolucio. Ili havas relative altan politikan konscion kaj estas sentemaj por batalo inter la du klasoj kaj du linioj en la universitato. En septembro de 1973, la studentoj de la fakultato de okcidentaj lingvoj rimarkis, ke en la universitato levis reakcia pensfluo, kiu provas nei la atingojn de la eduka revolucio kaj restarigi malnovan sistemon, kaj tuj poste ili skribis dazibaŭon por rebati ĝin plene plenuminte sian rolon "viziti, administri kaj reformi la universitaton per Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso".

De 1970 la Pekina Universitato jam kvinfoje varbis pli ol 8,000 laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn studentojn. La unuaj 2,600 diplomiĝintoj jam iris al produktaj kaj sciencesploraj postenoj. Krome la universitato ankoraŭ funkciigis kursojn kun lernotempo de unu aŭ pli ol unu jaro, kiuj akceptis ĉirkaŭ 40,000 spertoriĉajn laboristojn, kamparanojn, soldatojn, kadrojn kaj teknikistojn en kvar jaroj.

## MALLONGIGO DE LERNOTEMPO

La lernotempo en la malnova Pekina Universtitato estis kvin jaroj kaj tiu de iuj ĝiaj fakoj eĉ ses jaroj. La nuna lernotempo estas tri jaroj.

Kvankam la lernotempo estas mallongigita, tamen studentoj povas ellerni pli multajn sciojn. Tion oni ŝuldas al mallongigo aŭ forigo de senutilaj lernoobjektoj kaj ripetaj lernomaterialoj. En la pasinteco la proporcio de legado inter klasikaj verkoj kaj modernaj libroj estis 5:1 en la literatura fako de fakultato de la ĉina lingvo. Nun laŭ la principo "multe legi aktualaĵojn kaj malmulte antikvaĵojn" oni disponigas pli multe da tempo al studentoj por studi marksisman kaj leninisman literaturan kaj artan teorion, elstarajn modernajn literaturajn verkojn, verkan praktikadon kaj literaturan kaj artan kritikon krom la nepre studendaj klasikaj kaj fremdlandaj literaturoj.

Konforme al bezono de lernado post mallongigo de la lernotempo la instruistoj de la Pekina Universitato kompilis pli ol

*Ministo rakontas pri la mineja historio al studentoj de la historia fakultato.*



500 specojn da novaj lernomaterialoj en kelkaj jaroj laŭ la principo "malmulto kaj elito". *Monda Historio* kompilita de la instruistoj de la historia fakultato karakteriziĝas per klara kaj simpla enhavo kaj elstara starpunkto. *Principoj de Kemiaj kinetikoj kaj Reakciiloj* kompilita de Profesoro Tang Joŭki k.a. de la kemia fakultato estas relative bona lernolibro kun teorio kaj praktiko en kombiniĝo.

En instruado oni aplikis edifan metodon anstataŭ inokulan, tio estas, instruisto disdonas lernomaterialojn al studentoj antaŭ la leciono kaj dum leciono studentoj povas elmeti siajn vidpunktojn por kune kun instruisto diskuti. Tia instrua metodo povas levi aktivecon de studentoj pri memprienso kaj starigi revolucian, demokratian kaj unuiĝan rilaton inter instruistoj kaj studentoj.

## FUNKCIIGI LERNEJON KUN MALFERMITA PORDO

La metodo "funkciigi lernejon kun malfermita pordo" en Ĉinio signifas, ke lernejo starigas fiksitan rilaton kun fabriko kaj kamparo aŭ lernejo mem funkciigas fabrikon kaj kultivejon por ke instruistoj kaj lernantoj strikte kombiniĝu kun laboristoj kaj kamparanoj, eduko kun produktado kaj scienca teorio kun praktikado.

Laŭ la proleta eduka linio de Prezidanto Maŭ oni devas meti la transformon de penso de lernantoj en la unuan lokon en lerneja eduko. Funkciigi lernejon kun malfermita pordo celas al tio, ke lernantoj kombiniĝu kun laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ne apartigu sin de amasoj, studu Marksismon, Leninismon kaj Maŭzedongpenson en klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, plie havigu al si sentimenton de laborantaj popolanoj kaj estu daŭrigantoj de la proleta revolucia afero.

Ĉiuj natursciencaj fakoj de la Pekina Universitato iom post iom starigis novan sistemon kun instruado, produktado kaj scienca eksplorado en kombiniĝo. En la lernado studentoj ne blinde kredas pri la libraj scioj kaj kuraĝas fari kreon. Studentoj de la fako de komputero partoprenis en provproduktado de la elektra komputero, en kiu ili lernis samtempe la principojn de la maŝino. Iuj studentoj mem kompilis kontrolajn programojn kaj trovis kontraŭdirojn malfacile troveblajn en iuj instrukcioj. Iu laborista studento trovis iun parton neracia en projektado dum ĝustigo de la maŝino kaj elmetis projekton por plibonigo. Studentoj de tiu fako de la malnova universitato eĉ malofte tuŝis kom-



*Socia enketado en kamparo*



*Feng Joŭlan (dekstre), profesoro de la filozofia fakultato, kune kun studentoj kritikas Lin Biaŭ kaj Konfucion.*

puteron dum sia 6-jara lernado, kaj ili povis fari komputeron nur sur papero.

Matematiko estas de ĉiam rigardata kiel la plej abstrakta scienco. Nun instruistoj kaj studentoj de la fakultato de matematiko kaj mekaniko iris al fabrikoj, minejoj kaj olekampoj kaj petis tie veteranajn laboristojn kaj teknikistojn doni al ili lecionojn pri analiza geometrio lige kun produkta praktiko, tiel ke "kvantoj" kombiniĝis kun "formoj". Dank' al tio studentoj povas rapide kompreni kaj posedi teoriojn kaj ankaŭ scias kiel uzi la lernitan teorion en praktikado.

La sociciencaj fakoj prenas la tutan socion kiel sian fabrikon. Krom lerni teoriajn sciojn en la universitato, studentoj devas iri al fabrikoj kaj kamparo por studi en praktikado koncerne sian fakon.

Dum lernado de politika ekonomiko de la socialisma periodo, studentoj de tiu fakultato iris al iu fabriko por fari fakan enketon pri "vojo de la ĉina socialisma industriigo". Ili enketis la ŝanĝiĝon de produktado de la fabriko antaŭ la granda kultura revolucio, faris sintezan analizon al la granda kvanto da akiritaj materialoj per lernita teorio kaj atingis kompletan konon. Tiamaniere studentoj pliprofundigis la komprenon pri teorio kaj kulturis en si kapablon analizi kaj solvi praktikajn problemojn.

"La nomita lerna metodo vivigis la mortan fakon." Oni tiel diris pri arkeologia fako de la historia fakultato. En la pasinteco tiu fako atentis nur pri fosado de tomboj kaj vicigo de elfositaj objektoj laŭ kronikoj. Ili tute ne ligis studon kun siatempa klasa batalo nek servigis ĝin al aktuala batalo. Nun instruistoj kaj studentoj de la fako prenis batalan taskon elmetitan en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kiel sian esploran temon. Dum lernado de "Arkeologio de Militantaj Regnoj kaj Dinastioj de Kin kaj Han" ili klarigis progresecon de reformo de Ŝang Jang en Kin per malsameco de entombigo inter Kin-regno kaj orientaj ses regnoj kaj kritikis reakcian penson de Lin Biaŭ kiu kultis al konfucianismo kaj oponis kontraŭ legalizismo. Dank' al tio ili atingis celon servigi antikvaĵon al nuntempo.

## ĜOJIGAJ FRUKTOJ

Kvankam la eduka revolucio de la Pekina Universitato estas kondukita nur kelkajn jarojn kaj iuj reformaj rimedoj ankoraŭ devas esti perfektigitaj en praktikado, tamen ĝi jam portis al la lernejo profundan ŝanĝiĝon. Ĉiujare la universitato ne nur kulturas por la ŝtato nombron da revoluciaj kadroj kaj konstruaj lertuloj havantaj altan politikan konscion kaj fakajn sciojn, sed ankaŭ rekte servas al industria kaj agrikultura produktado per siaj multaj esploraj temoj.

Ĉiuj fakoj de la Pekina Universitato faris multajn esplorajn temojn en tri jaroj, inter kiuj plejparto jam akiris sukceson. Ekzemple, integra cirkvita elektrona komputero kun milionoj da fojoj po sekundo, la unua de nia lando projektita kaj provfarita de la universitato kaj aliaj unuoj, kaj mezurado per X-radia difrakto al kristala strukturo de porka insulino kun distingiteco de 1.8 anstromoj atingis internacian aŭ enlandan progresan nivelon.

En praktikado por diplomiĝo la unuaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de la fakoj de lasero kaj magnetismo plenumis 48 esplorajn temojn, inter kiuj 22 atingis aŭ proksimiĝis al enlanda avangarda nivelo kaj 24 estas adoptitaj de produktaj kaj esploraj unuoj.

De septembro de 1973 la unuaj studentoj de la filozofia fakultato komencis kritike komentarii *Lunju* (*Vortojn de Konfucio*) per sentima revolucia spirito kaj en kelkaj monatoj ili plenumis la komentariojn kun pli ol 300,000 ĉinaj ideografiaĵoj, kiuj ricevis ĝeneralan laŭdon. En la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio instruistoj kaj studentoj de la sociscienacaj fakoj skribis pli ol 2,000 kritikajn artikolojn kaj 20 specialajn librojn. Tiuj studentoj, kiel Lenin diris, "**jam fariĝis partoprenantoj de la batalo por renversi ekspluatantojn en tempo de sia lernado**".

La eduka revolucio havigis grandan ŝanĝiĝon ankaŭ al spirita fizionomio de instruistoj de la Pekina Universitato. Dum partopreno en fizika laboro kaj praktiko de la eduka revolucio en fabrikoj kaj minejoj, Profesoro Ĝoŭ Jiliang de la historia fakultato vidis, kiel la laboristoj diligente kaj sinforgese laboras por krei materian riĉaĵon por socialismo kaj ludas rolon de ĉefaj fortoj en kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj esplorado pri la historio de la batalo inter konfucianismo kaj legalizismo kaj de la tuta klasbatalo, kaj ricevis el tio profundan edukon. Dum sia esplorado de historio en kelkdek jaroj li tamen rigardis la popolamasojn kiel plebojn, kaj imperiestrojn, reĝojn, generalojn kaj ministrojn kiel mastrojn de la historio. Li diris, ke tio estas renversita historio. Instruado de tia historio signifas servi ne al la popolo, sed al ekspluata klaso. Dank' al granda kultura revolucio kaj kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, granda ŝanĝiĝo okazis al mondkoncepto kaj vidpunkto pri sciencoj de Profesoro Ĝoŭ Jiliang. Nun en la Pekina Universitato pli kaj pli multiĝas instruistoj kiel la nomita profesoro, kiu diligente reformas sian burĝan mondkoncepton kaj ekstaras ĉe flanko de la proletaro kaj la popolamasoj ankaŭ en vidpunkto pri sciencoj.

Progresas maljunaj profesoroj kaj ankoraŭ pli vigliĝas junaj kaj mezaĝaj instruistoj kiuj formis jam ĉefajn fortojn de la eduka revolucio en la universitato. La universitato donis grandan atenton al konstruado de la instruista vicaro. Krom inviti laboristojn-instruistojn kaj kumulajn instruistojn por plifortigi la profesian vicaron, la diversnivelaj gvidantoj de la universitato kreis kondiĉojn por ebligi al la instruistoj ricevi reedukon en fabrikoj kaj kamparo, reformi malnovajn pensojn kaj studi profesiajn laborojn kaj samtempe disvolvis ilian aktivecon en diversaj laboroj por ke ili kontribuu al la eduka revolucio.

TANG JOŬKI*:

# La Eduka Revolucio por Mi

Mi faras instruadon pri fizika kemio en la kemia fakultato de la Pekina Universitato jam pli ol dudek jarojn. La Granda Proleta Kultura Revolucio havigis al mi novan komprenon pri la eduka laboro kaj profundigis al mi novan konon pri la instruado de fizika kemio.

En la jaro 1951, mi revenis de Usono al la liberigita nova Ĉinio. Tiam mi estis multe kuraĝigita de tio, ke la ĉina popolo fine stariĝis sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Kompartio, kaj volis kontribui per mia tuta forto al konstruado de la nova Ĉinio.

En la komenco post la Liberiĝo la universitato anstataŭigis la britan kaj usonan instruajn sistemojn per la sovetunia, kiun mi ne tiel ŝatis en la unua tempo. Sed mi alkutimiĝis al ĝi iom post iom, ĉar ambaŭ ili diferencas unu de alia nur en formo sed neniom en esenco. En la Pekina Universitato siatempe oni ankoraŭ metis "klerecon sur la unuan lokon" kaj "teorion super ĉion". Kaj en mia instruado, mi donis multe da teorio de koncepto ĝis koncepto al la studentoj. Tiam mi pensis, ke tio estas la ĉefa instrua metodo por fakoj de naturaj sciencoj kaj oni povas reformi ĝin nur malmulte.


Post la komenco de la Granda Proleta Kultura Revolucio, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj kritikis la reviziisman edukan linion, malkovris kaj kritikis la seriozan sekvaĵon de apartigo de instruita teorio disde praktiko, kaj la kurso de fizika kemio trovis sin sur la atakata fronto. Oni diris, ke la kurso estas malfacile lernebla kaj uzebla en praktikado. Tiu kritiko montris al mi, ke certe ekzistas problemo en instruado. Sed kie troviĝas la problemo, kaj kiel la teorio povas ligiĝi kun la praktiko, pri tio mi havis neniun certecon.

En la fino de 1969, kiam arde iris la eduka revolucio, mi venis al kelkaj kemiaj fabrikoj en la antaŭurbo de Pekino por tie ricevi reedukon de la laborista klaso kaj lerni en produkta praktiko. Tie mi trovis tute malsama la atmosferon. En iu tempo mi laboris samtempe en du fabrikoj. Foje, kiam mi venis al unu el ili vizitita de mi antaŭ duonmonato, mi tamen ne povis trovi ĝian pordon pro ĝia disvastiĝo. Kaj kiam mi venis al la alia post kelkaj tagoj, mi tuj vidis ke tie stariĝis nova reakcia turo. Tiu prospereco en nia industria fronto multe pensigis al mi, ĉu mi ne devas pli multe kontribui al la industria konstruado de la patrolando. La laboristoj kiel mastroj de la ŝtato donis al mi profundan edukon. Foje kiam ni ĵus venis al iu fabriko, okazis tie paneo de oksida turo. Pri tio maltrankviliĝis la laboristoj. Iuj el ili ekiris al laboratorio, aliaj rapidis al biblioteko por konsulti materialojn. Ankaŭ mi tiam tre maltrankviliĝis kaj kune kun la laboristoj serĉis kaŭzon, analizis problemojn por forigi la obstrukcon.

En la komuna batalado, la laboristoj donis al mi profundan impreson per sia bona kvalito kaj riĉa praktika sperto, kaj mi ricevis hardon kaj provon en praktikado.

Malsamaj al la vantemaj intelektuloj, la laboristoj estas tute respondemaj pri sia laboro, tamen ili ne maltaksis la teorion, kaj faris seriozan studon kaj konsideron pri miaj opinioj kaj analizoj. Ili taksas librajn sciojn ĉiam per tiu normo, ĉu ili povas aŭ ne solvi praktikan problemon.

Foje, malbone funkciis reaktoro por fendado de iu kemia fabriko. Mi opiniis ke tion kaŭzis eble malbona fendiĝo de sulfata acido pro malĝusteco de komponaĵoj de reakcia likvo. Je tio, iu laboristodevena kadro proponis ke oni ekzamenu antaŭ ĉio la nutran pumpilon. Oni trovis fine ke difektiĝis iu parto de la pumpilo, kaj pro tio la sulfata acido ne povis flui en la reaktoron. Vere estis ke problemojn en produktado solvis spertoriĉaj laboris-



*Profesoro Tang Joŭki*

toj, sed ne profesoroj kia mi de la altlernejo. Tio vekis ĉe mi profundan respekton al la laborista klaso kaj proksimigis min al produkta praktikado. Dank' al tio, poste mi povis iom post iom ŝanĝi mian penson malestimi praktikon, kompare memkonscie lerni de laboristoj kaj de produkta praktiko kaj fari iujn reformojn al instruaj materialoj de fizika kemio sur tiu ĉi bazo.

La afero meditigis al mi ankaŭ pri tio: Mia analizo jam ne estis nur teoria sed praktikebla. Sed en la produkta praktikado troviĝas ja plifundamenta scio, kiu estas neniel trovebla en klasĉambroj kaj libroj. Por ke studentoj posedu plenajn sciojn, instruado devas esti kombinita kun produkta praktiko.

La ŝanĝiĝo en mia penso akrigis mian vidon pri la problemoj ekzistantaj en la pasinta instruado de fizika kemio. Antaŭe, la studentoj lernis nur en lernejo kaj legis nur librojn, tiel ke ili ne povis ĝuste trakti la rilatojn inter politiko kaj aliaj profesioj kaj inter teorio kaj praktiko. Multaj diplomitoj el tiaj malnovaj lernejoj malestimis la praktikon kaj la spertoriĉajn laboristojn. Troviĝas iu diplomito de la Pekina Universitato antaŭ la kultura revolucio, kiu estis sendita al iu kemia institucio. Kelkajn jarojn poste, li ankoraŭ tiel veis: "La laboro tie ĉi ne estas scienca esploro kiu bezonas teorion." Fakte, la instrua metodo aplikata de la malnova lernejo malhelpis al li solvi praktikajn problemojn per la lernita teorio, kaj ankaŭ li malalte taksis la esplorajn temojn rekte servantajn al la produkto. Poste, mi kondukis laboristajn, kamparanajn kaj soldatajn studentojn al tiu ĉi institucio por studi katalizilon. Tiu studado ne nur havis praktikan signifon, sed ankaŭ bezonis la teorion de struktura kemio kaj kemia kinetiko.

Kial la antaŭaj studentoj ne sciis uzi la lernitan teorion en praktikado? La kaŭzo kuŝis ofte en tio, ke ni instruistoj mem ne komprenis la produktan praktikon nek povis uzi la teorion. Dum la lekciado, ni iam kombinis nian teorion kun praktikoj, kiuj tamen estas fremdlandaj menciitaj en la libroj kaj apartiĝantaj de niaj konkretaj kondiĉoj, kaj plie la produkto de nia lando rapide progresis ĉiutage. Tial instruistoj devas unue iri al produkta praktikado por ke studentoj ligu la lernitan teorion kun praktiko.

Post partopreno en produkta praktiko, mi denove foliumis la malnovajn instruajn materialojn kaj trovis tie la problemojn. Sen praktiko ni ne sciis, kiujn teoriojn la studentoj devas multe lerni, dum kompilado de instruaj materialoj, opiniante, ke ju pli multe ni instruas teoriojn des pli bone estas. Kaj en tio ni sentis nin diligentaj kaj respondecemaj al la studentoj. Nun, ni unue iras al fabriko, lernas uzi teorion tie en praktika produktado. Tio faciligas al ni kapti la gravitan punkton kaj kombini teorion kun la produkta praktiko de nia lando en nia instruado.

Dum kompilado de instrua materialo de kemia kinetiko, mi iris al fabriko kaj analizis tie serion da tipaj kemiaj reakcioj kaj reakciiloj. Kombininte koncernan teorion, mi induktis per tio fundamentajn konceptojn kaj konkretajn vojojn por analizi ĝeneralajn kemiajn reakciojn kaj reakciilojn, kaj skribis tiun konon en instruan materialon, tiel ke teorio kombiniĝis kun praktiko en libro. La instrua materialo tiamaniere kompilita estas malmulta kaj elita, kaj favoras al mallongigo de lernotempo kaj levo de labora kapablo de studentoj.

Troviĝas iu studento de la fako de altpolimero de kemia fakultato, kiu venis de kemia fabriko. Kiam li finis la kurson de kemia kinetiko, li prezentis la demandon kiel pli bone trakti la problemon de vost-gaso renkontitan de li en la antaŭa laborposteno. Li memstare faris unuapaŝajn projekton kaj kalkulon. La afero estis neniam trovita en la malnova lernejo. La kompilado de novaj instruaj materialoj ankaŭ kreskigis al mi la kapablon por analizi kaj solvi problemojn. En la lastaj kelkaj jaroj, mi elmetis projektojn kaj proponojn por plibonigi kelkajn reakciilojn.

La eduka revolucio vidigis min pri la graveco de reformo al instrua metodo. Antaŭe mi opiniis ke oni povas lerni la scion de naturaj sciencoj per ĉiu ajn metodo, se nur li povas bone posedi ĝin. Post partopreno en la eduka revolucio, mi jam vidis, ke la instrua metodo koncernas problemon kiajn studentojn kulturi.

La malnova metodo antaŭ la kultura revolucio malebligis al la studentoj ligi la lernadon kun la socialisma konstruado. Kaj krome la lernejo tiam sub la regado de reviziisma linio inokulis al la studentoj la penson pri ĉaso de famiĝo kaj specialistiĝo. Kvankam la studentoj kulturitaj per tia metodo povas iri la vojon kombini kun laboristoj kaj kamparanoj kaj servi al socialisma konstruado post partopreno en laboro kaj hardado en praktiko sub la eduko de laborista klaso, tamen por tio ni devas pagi tro multe en politiko kaj profesio. Tial por nia socialisma lando, la eduka revolucio kaj reformo de eduka metodo nepre devas esti farataj.

Hodiaŭ, socialismaj universitatoj metas la transformiĝon de studenta penso en la unuan lokon. La studentoj akiras sciojn kaj de libroj kaj de produkta praktiko. En sia lernotempo ili jam strikte rilatiĝas kun laborista kaj kamparana amasoj kaj post sia diplomiĝo ili povas servi al socialisma konstruado kaj la laboranta popolo per sia lernita scio. Oni povas trovi multe da tiaj studentoj ĉiuflanke disvolviĝantaj ĉu en moralo aŭ en klereco kaj korpo en la Pekina Universitato kaj en nia fakultato en la lastaj kelkaj jaroj. Tio ankaŭ kreskigis al mi memfidon kaj fortojn por ĝisfine konduki la edukan revolucion.

Puŝate de la kultura revolucio, mi eliris el la universitato kaj ricevis la reedukon de laborista klaso, kio akcelis reformon de mia penso kaj pliboniĝon de la instrua laboro. Kvankam mi faris nur ion en kompilado de libro *Principoj de Kemiaj Kinetikoj kaj Reakciiloj*, tamen la partia komitato kaj laborista propaganda taĉmento de la universitato kaj laboristoj kaj teknikistoj de la fabriko jam donis al mi grandan laŭdon. La kvarjara praktikado komprenigis al mi, ke la vojo de kombino kun laboristoj kaj kamparanoj laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ estas la vojo nepre irota por reformi malnovajn altlernejojn, malnovan edukan sistemon kaj la burĝan mondkoncepton de intelektuloj. Tiun ĉi vojon mi nepre iros ĝisfine.

---

**La aŭtoro estas profesoro de la kemia fakultato de la Pekina Universitato.*




## BONA SUKCESO DE MALPEZINDUSTRIA PRODUKTADO

Puŝate de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la malpezindustriaj fakoj de diversaj lokoj de nia lando energie disvolvas produktadon kaj akiris bonan sukceson.

Ŝanhajo atingis ĝojigan sukceson en produktado de brakhorloĝo, fotografilo, biciklo kaj kudromaŝino. La statistiko diras, ke produktokvantoj de brakhorloĝo kaj fotografilo tie plimultiĝis respektive je 14% kaj 41% de januaro ĝis novembro en 1974 kaj tiuj de biciklo kaj kudromaŝino atingis la plej altan nivelon de la sama periodo en la historio. Iuj fabrikoj provfaris novajn brakhorloĝojn, altklasajn fotografilojn kaj aliajn fotoaparatojn.

Ankaŭ Kantono superplenumis planon de malpezindustria produktado. La produktokvanto de kudromaŝino, biciklo, vekhorloĝo, seka pilo, poŝlampo, enladigita manĝaĵo, vivbezonataj emajlaj objektoj, kotonaj ŝpinitaĵo kaj ŝtofo kaj aliaj multe kreskis kun rimarkinde bona kvalito.

En urbo Anjang de Henan-provinco, kie abunde produktiĝas kaj greno kaj kotono, senĉese kreskis la kvanto kaj specoj de malpezindustriaj produktaĵoj kaj pliboniĝis ilia kvalito. Tie nombro de malpezindustriaj fabrikoj plimultiĝis de 39 en 1965 ĝis 62 nun kaj specoj de la produktaĵoj atingis pli ol 4,000.

Ankaŭ urbo Dandong en Liaŭning-provinco superplenumis la ŝtatan planon de silka teksado kaj ĝia produktovaloro senĉese pliiĝis.

# Post Reveno al Laborposteno

EN la komenco de la jaro 1974, diplomiĝis la unuaj laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj de nia lando. Ili revenis respektive al sia laborposteno, viglecplene ekpartoprenis en klasbatalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj faris novan kontribuon al socialismaj revolucio kaj konstruado. En tiu ĉi artikolo ni prezentu al niaj legantoj bonajn farojn de kelkaj studentoj diplomiĝintaj el la Pekina Universitato.

## NOVULO DE TEORIA FRONTO

Ĝang Daŭmi estis studento de la filozofia fakultato de la Pekina Universitato. En marto de la jaro 1974, post la diplomiĝo li revenis al sia antaŭa labora unuo — la Pekina Filio de la Ĉina Popola Banko. En la pasinta jaro, sub la gvido de la partia komitato de la filia banko, li aktive partoprenis en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj estis elektita kiel membro de la teoria grupo de la banko.

Dum tri jaroj en la universitato, Ĝang Daŭmi diligente studis Marksismon, Leninismon kaj Maŭzedongpenson, per kiuj li sekcis kaj kritikis reviziismon kaj diversajn kontraŭmarksismajn pensojn kaj tiel altigis sian kapablecon en analizo kaj solvo de problemoj. Reveninte al la laborposteno, Ĝang Daŭmi kun plena batala spirito decidis pli bone lerni kaj propagandi Marksismon kaj kritiki reviziismon en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio por kontribui al pluapaŝa fortigo de proleta diktaturo.

En la komenco de studo de la historio pri batalo inter konfucianismo kaj legalizismo, li venis en bibliotekon por trovi la bezonatajn materialojn. Krome li serioze refoliumis la historiajn materialojn lernitajn en la universitato. Reakciaj regantaj klasoj de ĉiuj dinastioj energie distordis la historion, tio malfaciligas ĝustan takson pri la batalo inter konfucianismo kaj legalizismo. Sed sub la direktado de Marksismo, Ĝang Daŭmi kaj aliaj membroj de la teoria grupo fine faris kompare ĝustan analizon kaj takson al la historiaj personoj kaj eventoj. Ekzemple, el sia reakcia naturo la reakciuloj de ĉiuj dinastioj kaj Lin Biaŭ riproĉis la Unuan Imperiestron de Kin-dinastio kiel feŭdan despoton. Observante la instruon de Lenin "**Dum analizado de ĉiu ajn socia problemo, la marksisma teorio absolute postulas, ke oni metu la problemon en certan historian sferon**", Ĝang Daŭmi skribis artikolon *Progresema Rolo de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio en la Historia Turniĝo*, en kiu li konkludis el analizo pri tiama socio suferanta de dukaj separatismaj reĝimoj kaj oftaj militoj, ke unuigo de Ĉinio fare de la Unua Imperiestro de Kin-dinastio estis konforma al la deziro de la popolo kaj akcelis socian disvolviĝon, kaj per tio li jesis lian meriton en la historio. Kaj samtempe li montris en ĝi, ke la Unua Imperiestro de Kin-dinastio, kiel reprezentanto de la nova leviĝanta bienula klaso, havis la limigitecon de sia klaso kaj la historio.

Laŭ la bezono de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, Ĝang Daŭmi devis fari helpan lekcion ĉiusemajne. En tiuj tagoj, li senlace laboris, kaj eĉ en festtagoj ne ripozis. Dum du monatoj li kompilis lernomaterialon kun okdek mil ideografiaĵoj pri batalo inter konfucianismo kaj legalizismo en la periodoj antaŭ Kin-dinastio kaj de la Orienta kaj Okcidenta Han-dinastioj de Ĉinio. Samtempe li faris lernohelpan lekcion al la laborantoj kaj ricevis bonvenon de la laborantoj pro sia komprenebla eksplikado.

## STUDENTOJ BONVENAJ AL LABORISTOJ


Vang Gujĝen kaj Hu Hiaŭĉun estis laboristinoj de la Pekina Fabriko de Sciencaj Instrumentoj. En la jaro 1970, rekomendite de la laboristoj de la

fabriko, ili komencis lerni en la fizika fakultato de la Pekina Universitato.


Kiam ili revenis al la antaŭa fabriko post sia diplomiĝo, la laboristoj varme ilin bonvenigis. Gvidantoj de la fabriko postenigis ilin kiel teknikistojn de lasera grupo. Frue en la tempo, kiam ili lernis en la universitato, ili jam estis konataj de la grupo, ĉar ili faris tie produktan kaj diplomiĝan praktikon. Tiam la grupo estis en provfabrikado de iu lasera aparato, kies elsenda povo estas malalta kaj nestabila, kaj ili prenis la problemon kiel temon por diplomiĝa praktiko. Sub la direktado de la instruisto, uzante la lernitan teorian scion kaj kalkulan metodon kaj samtempe modeste lernante de laboristoj praktikan sperton, ili ripete faris eksperimenton tri monatojn kaj fine oble altigis la elsendan povon.

En la unua tago post la reveno al la fabriko, ili en laborkostumo venis en la laseran grupon kaj laboris kune kun majstroj por koni teknologion de diversaj produktaĵoj. Post nelonge, la gvidantoj de la fabriko taskis al ili respektive la provfabrikadon de du novaj produktaĵoj. Helpate de veteranaj teknikistoj kaj laboristoj, ili zorgeme faris projekton kaj persone prilaboris ekipaĵon. Ĉe manko de norma optika vitropeco en provfabrikado, kamaradino Vang venis al la optika laborejo, en kiu ŝi iam laboris, por froti ĝin. Kiam oni bezonis malvarme prilabori metalaĵon, kamaradino Hu mem prilaboris ĝin en la metala laborejo, kie ŝi laboris antaŭ vizito al la universitato. Dank' al fervora helpado de majstroj de la laborejoj la du novaj produktaĵoj estis sukcese provfabrikitaj nur en tri monatoj kaj atingis projektan postulon en kvalito. Iu kompare maljuna teknikisto emocie diris: "En pasinteco, ni lernis teorion disde produkta praktiko en universitato. Post la diplomiĝo, ni povis plenumi nur iujn helpajn laborojn, kaj memstare labori nur post du aŭ tri jaroj. Nun, malgrandaj Vang kaj Hu povas sole plenumi taskojn projekti kaj provfabriki novajn produktaĵojn nelonge post la diplomiĝo, tio estas frukto de la eduka revolucio!"

Por plivastigi produkton kaj daŭre altigi kvaliton de produktaĵo, Vang Gujĝen kaj Hu Hiaŭĉun ne nur mem diligente studis teknikon, sed ankaŭ iniciate helpis laboristojn de la grupo en lernado de tekniko. Kvankam multaj laboristoj akumulis riĉan praktikan sperton en longtempa produkta praktiko, tamen ili havis certan malfacilon en altigo de tekniko pro manko de teoria scio. Kamaradinoj Vang kaj Hu pacience instruis al la laboristoj la laseran teorian scion kaj iujn kalkulajn metodojn, kiujn ili lernis en la universitato. Dank' al tio la teknika nivelo de la tuta grupo estis altigita. Laboristoj ĝoje diris: "Malgrandaj Vang kaj Hu ne nur povas solvi iujn komplikajn teknikajn problemojn en produkto kombinante teorion kun praktiko, sed ankaŭ povas teoriigi praktikan sperton. Ni bezonas tiajn studentojn."



*Vang Gujĝen (dekstre) kaj Hu Hiaŭĉun en laborado*



*Song Ŝuju (la dua de maldeksre) en provado de instrumento*

## LI ANKORAŬ RESTAS ORDINARA LABORISTO

En junio de 1970, ĝojiga informo ke veterana laboristo Song Ŝuju vizitos altan lernejon disvastiĝis en la Metalurgia Eksperimenta Fabriko de Pekino. Iuj diris: "Kamarado Song estas avangarda laboristo en revolucio kaj produkto, kaj oni ja devas rekomendi lin por viziti universitaton." Sed aliaj maltrankviliĝis de tio, ke li ne povas plenumi lernan taskon pro lia malalta klereco. Song Ŝuju pensis en si: Laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj vizitas altajn lernejojn, tio estas nova afero aperinta en la Granda Proleta Kultura Revolucio. La rekomendo de amasoj kaj sankcio de la gvidantaro montras zorgadon de la Partio kaj komision de la klaso al mi, tial mi nepre ne vanigos la esperon de la Partio.

Veninte al la Pekina Universitato, li eklernis en la magnetisma fako de la fizika fakultato. En la komenco li renkontis multajn malfacilojn en lernado. Sub la kuraĝigo de la partia organizo kaj la laborista propaganda taĉmento, kaj entuziasma helpado de instruistoj kaj kolegoj, li firmigis sian memfidon. Li ofte uzis ripozan tempon kaj dimanĉojn por lerni fundamentajn sciojn de matematiko kaj elektromagnetismo. Li kun obstina persisteco finlernis fundamentan teorion de magnetismo kaj akiris bonan sukceson en ĉiuj lernoobjektoj.

En aŭgusto de 1974, Song Ŝuju komencis fari la diplomiĝan praktikon. Kiun temon li elektu por diplomiĝa praktiko? Li pensis, ke en la malnova universitato la studentoj faris diplomiĝan projekton apartiĝantan de produkta praktiko. Nun, ni laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj ne devas iri laŭ la malnova vojo kaj la diplomiĝan temon oni nepre devas servigi al produkto kaj konstruado. Li do revenis al sia fabriko por scii, kiajn sciencajn esplorajn temojn la fabriko urĝe bezonas. Tiam, la fabriko decidis provprodukti iun novan alojon. Song Ŝuju kaj lia kolego prenis sur sin la taskon kiel sian temon por diplomiĝa praktiko. Helpate de instruistoj kaj teknikistoj, ili serioze eksperimentis kaj studis ĉiun donitaĵon kaj fine fabrikis la alojon. Pri tio ili skribis detalan raporton kun precizaj donitaĵoj kaj ĝusta konkludo. Poste, Song Ŝuju estas invitita kiel vicĉefredaktoro de la gazeto *Fiziko.* Oni varme laŭdis lin pro lia rapida progreso post vizitado de la socialisma universitato.

Post la diplomiĝo, Song Ŝuju revenis al la Metalurgia Eksperimenta Fabriko kaj estas postenigita en la elektromagneta mezura grupo. En la universitato li ĉefe studis scion pri magneta materialo, sed nun li devas esplori proprecon de magneto. Kiel plenumi tiun laboron? Song Ŝuju firme respondis: "Kiel komunisto, mi devas bone plenumi la taskon, kiun la Partio donis al mi!" Veninte al la mezura grupo, li modeste lernis de laboristoj kaj teknikistoj kaj diligente studis radioteknikon utiligante postlaborajn horojn, tial en mallonga tempo li posedis metodon mezuri magneton per kontinua kurento, alterna kurento kaj pontocirkvito.

Lastatempe, kun plena memfido Song Ŝuju kune kun aliaj laboristoj kaj teknikistoj energie laboras por plenumi alian novan sciencan esploran taskon.


# Montvilaĝa Lernejo



Al lernejo

Juanling-vilaĝo de Jangĉeng-gubernio, Ŝanhi-provinco, troviĝas en montaro. Antaŭ la Liberiĝo, tie estis nur unu privata lernejo funkciigita de bienulo, kaj la gefiloj de kamparanoj ne havis rajton viziti ĝin. Post la Liberiĝo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj starigis elementan lernejon. Post la kultura revolucio ili komencis administri ĝin kaj ascendis la podion de klasĉambro, tiel ke rapide disvolviĝas la edukado de la lernejo. Antaŭe ĝi havis nur unu klason kun unu instruisto kaj 36 lernantoj kaj nun havas jam kvin klasojn kun ses instruistoj kaj 156 lernantoj, kaj krome akceptas eĉ infanojn kiuj ankoraŭ ne atingis lerno-aĝon.

Fotoj de **Vang Jonglu**



Malriĉkamparano rakontas pri la mizera vivo en la malnova Ĉinio.

Legado post lecionoj



Eksperimentado pri polenado al tritiko



Instruado sur kampo



Instruistoj diskutas pri plibonigo de instruado.





Komunumanoj rigardas kaj juĝas la verkojn de studentoj.

# Instituto Funkcias en Kamparo

Kamparano-amatoro Lin Ĝide prezentas siajn spertojn pri kreado al la instruistoj kaj studentoj.



La Belarta Instituto sub la Centra Arta Universitato "la Sepa de Majo" funkcias en la kamparo de Huhian-gubernio, Ŝenhi-provinco. Tie la instruistoj kaj studentoj laboras kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, akceptas ilian reedukon kaj modeste lernas spertojn de kamparanoj en kreado de pentrajoj. Kun kreado kiel ĉefa metodo, ili organizas instruadon lige kun la tri grandaj revoluciaj movadoj kaj faris fundamentan trejnadon pri pentrado.



Kreado post laboro

Lerno de kamparanino-pentristino Li Fenglan







Studo pri *Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an*



Prezenti pecon el la revolucia modela pekinopero *Ŝagiaban* por soldatoj

# Arta Taĉmento el Soldatoj

Informiĝi pri bonaj homoj kaj bonaj aferoj por verki programerojn





Sub la direktado de la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ, la soldata amatora literatura kaj arta propaganda taĉmento de iu artileria trupo de ĈPLA mem verkas kaj mem prezentas literaturajn kaj artajn programerojn spegulantajn heroaĵojn de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili ĉiam faras prezentadon ĉe landlimo, en gardejoj, fabrikoj kaj kamparo kaj trovis bonan akcepton.

Fotoj de **Jang Ĉanggong**

Kantodanco memverkita kaj prezentata






Prezentado en kamparo

# Ĝojiga Afero el la Tibeta Altebenaĵo

LA Tibeta Altebenaĵo, "Firsto de la Mondo", estas tre vasta. La meznombra alteco de la regiono estas pli ol 4,000 metroj super la mara nivelo. 70% de la kampoj dislokiĝas en la river-valoj je 3,000-4,100 metroj altaj super la mara nivelo, kie la senprujna tempo estas mallonga, la klimato kaprica kaj la grunda kondiĉo komplika, kaj ofte okazas katastrofoj de sekeco, prujno, hajlo kaj vento. Sin apogante sur la fortoj de la kolektiva ekonomio de la popolkomunumo kaj preninte Daĝaj kiel ekzemplon, miliono da tibetaj liberigitaj servutuloj penluktis kontraŭ naturaj malfaciloj kaj akiris riĉajn rikoltojn de agrikulturo en sinsekvaj jaroj. En 1974, pli ol 90% de la popolkomunumoj de la tuta aŭtonoma regiono grandmezure pliproduktis grenon. Post la jaro 1973, en kiu la pomua produktokvanto de greno de 5 gubernioj superis la normon difinitan de la ŝtato, ankaŭ aliaj kelkaj gubernioj atingis la normon en agrikultura produktado. La pomua produktokvanto de la plejparto de 320,000 muoj (1 muo = 1/15 hektaro) de vintra tritiko de la tuta regiono superis pli ol 200 kilogramojn. Laŭ la unua statistiko, la totala produktokvanto de greno de Tibeto pli altiĝis je 15% ol tiu de la riĉrikolta jaro 1973, t.e. 2.5-oblo de tiu de la jaro 1958 antaŭ la demokratia reformo. La riĉa rikolto de Tibeto metis fidindan materian bazon por firmigi kaj disvolvi la socialisman sistemon, plifortigi la proletan diktaturon, defendi la sudokcidentan landlimon de la patrolando kaj rapidigi la paŝon de la socialisma konstruado kaj socialisma revolucio de Tibeto. Tio estas grava afero kun strategia signifo en Tibeto, kaj ankaŭ forta bato al la malicaj atakoj kaj kalumnioj de imperiistoj, reviziistoj, reakciuloj kaj la perfida kliko de Dalai kontraŭ la socialisma nova Tibeto.

Sub la regado de feŭda servuta sistemo plej reakcia, malluma, kruela kaj barbara, la agrikultura produktado en la malnova Tibeto sin trovis en primitiva postiĝinta stato, kaj la produkta nivelo estis kompatinde malalta. La sklavoj kaj servutuloj vivis en malvarmo kaj malsato. Krome, pro la kruela persekutado de la reakcia registaro, superaj regantoj de temploj kaj nobeloj, la nombro de la tibeta loĝantaro reduktiĝis jaron post jaro. En la jaro 1959, sub la saĝa gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, miliono da servutuloj renversis la reakcian regadon de la feŭda servuta sistemo kaj fariĝis mastroj de la ŝtato. La Granda Proleta Kultura Revolucio puŝis la movadon de la socialisma reformo de agrikulturo kaj brutobredado de Tibeto al alta tajdo. Nun, 93% de subgubernioj de la tuta Tibeto jam fondis popolkomunumojn. Tiu ĉi fundamenta ŝanĝiĝo de la produkta rilato malfermis vastan perspektivon al rapida disvolvo de agrikulturo kaj brutobredado de Tibeto.

Post la komunumigo, sub la gvido de la Partio, la popolo de la gubernioj Gjangze, Banam kaj Ŝkaze unuiĝe batalis por dragi Nianĉu-riveron, konstrui digojn, reformi dezertajn bordetendaĵojn kaj konduki la riverakvon en kampojn, tiel ke la rivero fariĝis utila al la popolo. En la jaro 1974, la tri gubernioj ankoraŭfoje akiris riĉan rikolton de agrikulturo, kaj ilia totala produktokvanto de greno plimultiĝis ĉirkaŭ 3-oble ol tiu antaŭ la demokratia reformo. Tiaj ekzemploj kiel supre menciita ĉie vidiĝas sur la Tibeta Altebenaĵo. De vintro de 1973 ĝis printempo de 1974, la tuta regiono kreis ĉirkaŭ 300,000 muojn da teras- kaj ĝarden-kampojn, fosis pli ol 3,400 kilometrojn da kanaloj, konstruis kaj riparis pli ol 1,500 akvorezervejojn kaj lagetojn, dank' al kio plivastiĝis la irigacia areo je 300,000 muoj. Nun, la areo de irigaciataj kampoj jam okupis 70% de la totala agraro de la tuta Tibeto. La



*Tibetanaj komunumanoj selektas bonan specon de tritiko.*

rapida plibonigo de produktaj kondiĉoj de agrikulturo metis bonan bazon por grandmezura kaj stabila pliprodukto de greno.

En la pasinteco ne troviĝis travintra plantaĵo sur la Tibeta Altebenaĵo. Tamen, la liberigitaj servutuloj, kiuj frakasis la katenon de la feŭda servuta sistemo, kuraĝis en pensado kaj farado, reformis la malnovan sistemon pri terkulturado, disvolvis aktivadon pri scienca kulturado kaj sukcesis en grandarea kulturado de vintra tritiko. Nun, tie la vintra tritiko kreskas jam en la loko alta je 4,050 metroj super la mara nivelo. Pli ĝojiga estas tio, ke la pomua produktokvanto de tritiko en iuj terpecoj eĉ atingis 700 kilogramojn. La kulturita areo de tritiko en 1974 plivastiĝis je pli ol 1-oblo ol tiu en 1973, kaj oni ankoraŭfoje akiris grandarean riĉrikolton. La fakto montris, ke sub la socialisma kondiĉo la liberigitaj servutuloj armitaj per Marksismo, Leninismo kaj Maŭzedongpenso ne nur povas koni la naturon, sed ankaŭ povas posedi ĝian leĝon por servigi ĝin al la homaro.

En la malnova Tibeto, la reakcia feŭda servuta sistemo katenis la homan penson, subpremis la saĝon kaj kapablecon de la laboranta popolo, kaj tio grave malhelpis disvolviĝon de la produktaj fortoj. Kvankam la malnova sistemo jam estis ŝanĝita, tamen **"la restaĵo de la malnova ideologio, kiu spegulas la malnovan socisistemon, certe restas longtempe en la cerbo de homoj kaj ne volas facile evakui".** Kiam oni komencis haki montojn por fari kanalojn en la baza konstruado de kampoj en Tibeto, iuj homoj, kiuj havis feŭdan superstiĉon, diris, ke oni neniel devas tuŝi diajn montojn kaj konduki dian akvon. Profitante la okazon, la klasaj malamikoj agitis amasojn per la mensogaĵo "ĉion decidas la Ĉielo" por detrui la movadon de lerno de Daĝaj. En la Granda Proleta Kultura Revolucio kaj la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la liberigitaj servutuloj diligente studis verkojn de Prezidanto Maŭ, kritikis antaŭdestinismon, energie disvolvis la produktadon kaj akiris riĉajn rikoltojn unu post alia. En marto kaj aprilo de la jaro 1974, pli ol 9,000 muoj da kampoj de Giaĉa-gubernio ĉe la bordo de Jalucangpo-rivero estis atakitaj de fiinsekta katastrofo malofta en la historio. Sub la gvido de la partia komitato de Giaĉa-gubernio la tieaj popolanoj aktive partoprenis en la batalado por ekstermi fiinsektojn. Post monata klopodo, ili ekstermis la fiinsektojn kaj akiris riĉan rikolton. En la jaro 1974 la meznombra pomua produktokvanto de 14,000 muoj de vintra tritiko de tiu gubernio superis pli ol 300 kilogramojn. La popolo de Nimu-gubernio kritikis la feŭdan superstiĉon, ke la naturo estas neofendebla, hakis monton por konduki akvon kaj konstruis digojn,

tiel ke 78% de la totala agra areo estas irigaciata. En la jaro 1974, la tuta gubernio grandmezure pliproduktis grenon.

En la lastaj kelkaj jaroj, ĉiunivelaj partiaj organizoj de la Tibeta Aŭtonoma Regiono serioze plenumis la ĝeneralan principon por disvolvi la nacian ekonomion **"preni agrikulturon kiel bazon kaj industrion kiel gvidan faktoron"**, kaj energie entreprenis agrikulturon. Multaj kadroj profundiĝis en agrikulturajn kaj paŝtajn regionojn kaj kune kun la amasoj disvolvis la movadon de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, persistis en la socialisma direkto kaj firmigis kaj disvolvis la kolektivan ekonomion de la popolkomunumo. Tio estas radikala kaŭzo de la rapida disvolviĝo de agrikulturo de Tibeto. En la lastaj kelkaj jaroj, ankaŭ la brutobredado de la aŭtonoma regiono havis grandan disvolviĝon. La nombro de bovoj, ŝafoj, ĉevaloj ktp. plimultiĝis 1.3-oble ol tiu de 1958, la jaro antaŭ la demokratia reformo. Ankaŭ la porkobredado kaj arbokulturado havis rapidan disvolviĝon. Pluraj fruktoĝardenoj kaj teĝardenoj estis nove konstruitaj, kaj legomoj ekkulturitaj. La disvolviĝo de agrikulturo akcelis tiun de industrio. Hodiaŭ la malnova mizera kaj postiĝinta Tibeto sin turnis en la prosperan. La tibetaj liberigitaj servutuloj ĝoje diris, ke la nuna bonega situacio en Tibeto estas la abunda frukto de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj triumfa kanto de la proleta revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong.



*Kadro (dekstre) kaj komunumanoj de Liemaj-komunumo resumas sperton pri riĉa rikolto.*

*Riĉa rikolto de tritiko*



GAŬ ĜIBJAN:

# Fabriko Malgranda, Antaŭenpaŝo Granda

LA Ŝanhaja Dua Veldfabriko estas malgranda fabriko kun 240 laboristoj kaj oficistoj. Kvankam ĝi ne havas altajn domojn nek modernajn ekipaĵojn, tamen en la Granda Proleta Kultura Revolucio ĝi plenumis ĉiujare por la ŝtato malfacilan veldadon al centoj da gravaj ekipaĵoj, kun bona kvalito kaj per mallonga tempo, kaj kovris per iuj el la taskoj blankon de nia industrio. Ĝia produktokvanto de 1973 kreskis je 4.3-oblo ol tiu de 1965, la jaro antaŭ la kultura revolucio, kaj tiu de 1974 kreskis je 25 pocentoj ol tiu de 1973.


Kial la produkto de tiu ĉi malgranda fabriko povas disvolviĝi tiel rapide?

## KURAĜE PRENI SUR SIN PEZAN TASKON

La nomita fabriko estis fondita en 1958 el 42 metiejoj de veldado. Post la fondiĝo, la laboristoj mem konstruis laborejojn kaj fabrikis maŝinojn, sekvante la instrukciojn de Prezidanto Maŭ pri **"sinapogo sur propraj fortoj"** kaj **"lukto en mal-**

*Sekretario de la partia filio de la fabriko Ĵen Hikang interparolas kun laboristoj post labortempo.*





*Laboristoj transportas per du malgrandaj moveblaj gruoj la regeneran turon 17-tunojn pezan.*

**faciloj"**, tiel ke la fabriko iom post iom grandigis sian produktivon. En la arda movado de lerno de Daking en industrio, disvolvante la revolucian spiriton peneme entrepreni kaj kuraĝe preni sur sin pezan taskon, la kadroj kaj laboristoj de la fabriko decidis pli multe kontribui al la ŝtato same kiel la Daking-anoj, tiel ke pluapaŝe ŝanĝiĝis la fizionomio de la fabriko en sia produktado.

Foje, la fabriko ricevis urĝan taskon prilabori pli ol 100 gravajn ekipaĵojn por iu grava konstruaĵo. Laŭ ĝia tiutempa produktivo, oni bezonis tri monatojn por plenumi la taskon. Tamen la supera instanco postulis unu monaton, poste 20 tagojn kaj fine eĉ unu semajnon pro rapida irado de la konstruado.

Ho, kia malfacileco tio estas! Iuj diris, ke oni devus havi kvar manojn por plenumi tiun ĉi taskon. Sed aliaj diris: "La ŝtato postulas de ni plirapidigon de la produktado, tio signifas ke plirapidas la paŝoj de socialisma konstruado. Ĝuste tio estas nia deziro. Ni devas disvolvi revolucian spiriton kaj klopodi por kuratingi la bezonon de la ŝtata konstruado."

Ekagis la tuta fabriko sub la gvido de la fabrika partifilio. Oni faris konkretajn analizojn pri diversaj malfaciloj renkontotaj kaj favoraj kondiĉoj de la fabriko, tio multe kreskigis al ili memfidon. Ili ankaŭ esploris kaj aranĝis ĉiun el la laborprocedoj kaj elmetis multajn metodojn por altigi laborefikon. Dank' al tio, la laboristoj kaj kadroj de la tuta fabriko obstine kaj peneme plenumis la taskon per sep tagoj.

Ĝuste kun tia revolucia spirito la laboristoj kaj oficistoj de la nomita fabriko plenumis diversajn produktajn taskojn donitajn de la ŝtato dum la lastaj kelkaj jaroj. En la produkta praktikado, ne nur la veteranaj laboristoj kuraĝis preni sur sin pezajn taskojn kaj ludis ĉefan rolon, sed ankaŭ la junaj laboristoj, kiuj okupas du trionojn de laboristoj de la fabriko, diligente studas teknikojn por la revolucio prenante la veteranajn kiel siajn ekzemplojn kaj fariĝis vivplena forto en la produktado. La juna veldistino Hia Fengkin estas unu el ili. En la jaro 1968 kiam ŝi ĵus venis al la fabriko, ŝi ege malĝojiĝis pro ĝia malgrandeco. Ŝi pensis siatempe en si, ĉu tie ekzistas perspektivo por ŝi. Sed, poste influite de la revolucia spirito de maljunaj majstroj ŝi



*Intensa laborado*

komprenis la signifon de laboro. Foje en plenumado de la urĝa tasko, Hia Fengkin prenis sur sin veldon de nombro da rustimunaj ŝtalaĵoj. Post kelktaga streĉa laborado, al ŝi doloris ambaŭ kruroj pro longtempa kaŭrado. Tion vidinte, gvidantoj kaj aliaj kamaradoj admonis ŝin al ripozo, sed ŝi diris: "Mi devas lerni de majstroj. Nun pli kaj pli rapidas la konstruado de socialismo, mi devas diligente min hardi por multe kontribui al la patrolando." Dank' al sia persisteco ŝi plenumis la taskon.

## SIN APOGI SUR PROPRAJ FORTOJ

Kun la grandmezura kresko de produkto kaj senĉesa altigo de teknika malfacileco de produktaĵoj, la ekzistantaj produktaj ekipaĵoj kaj laborantoj de la dua veldfabriko ofte ne povas kontentigi la bezonon de produkto. Kiel do la kadroj kaj amasoj de la fabriko solvis tiun ĉi problemon?

Foje, ili ricevis taskon fabriki novan produktaĵon. La produktaĵo estas tre granda kaj multjunta. Ĝi postulas bonan kvaliton, bezonas grandan kvanton da malfacile veldebla rustimuna ŝtalo, specialajn ekipaĵojn kaj grandajn laborejojn. Tiam ĉiuj ĉi tiuj kondiĉoj mankis al la fabriko. Iuj plendis: "Nia fabriko kun malbonaj kondiĉoj ne devas akcepti tiun taskon." Aliaj proponis: "La ŝtato trudis la taskon al ni, ni do povas peti de ĝi investon por aldoni ekipaĵojn kaj konstrui laborejojn."

Sed, tion malakceptis la vasta amaso de kadroj kaj laboristoj. Iuj diris: "Ĉu en tio sin trovas iom da revolucia spirito de sinapogo sur propraj fortoj?" Aliaj diris: "Ni devas lerni de Dakinganoj, kaj krei kondiĉojn kaj konstrui ekipaĵojn mem se ili ne ekzistas."

La partia filio aktive subtenis tiun revolucian spiriton de la laborista amaso kaj gvidis ilin por trovi metodojn por venki la malfacilojn.


La rustimuna ŝtalplato bezonata de tiu ĉi produktaĵo estis tre granda, dum la fabrikejo malgranda. La laboristoj do volvis ĝin por fari veldadon. La ŝtala cilindro por la produktaĵo estis tre longa kaj la laborejo ne povis enteni ĝin en horizontaleco. Oni do faris lukon sur la tegmento de la laborejo, tiel ke la ŝtala cilindro povis stari tra la tegmento kaj oni povis prilabori ĝin vertikale. Kaj krome, laŭ la aparta postulo de la prilaboro, ili mem projektis kaj fabrikis bonan ekipaĵon per mallonga tempo kaj malmulta mono.

Veterana laboristo Ĝu Ĵenda estas unu el la lertuloj en teknika renovigo. Mankis tiam al la fabriko granda olepremilo, kio kaŭzis malfacilon al prilaboro de grandaj produktaĵoj. Li do proponis ke la fabriko mem fabriku 450-tunan olepremilon. Tamen tio estis tre malfacila por tiu ĉi malgranda fabriko. Majstro Ĝu lernis foje post fojo en aliaj fabrikoj. Li ne komprenis integran olean vojon, li do ĉiam kunportis la desegnon ĉe ŝi kaj ofte studis ĝin je libera tempo. Dank' al sia diligenta lernado en laboro, majstro Ĝu kun malalta klereco tamen fabrikis kune kun aliaj laboristoj kaj teknikistoj tiun ĉi grandan olepremilon. Dum la lastaj kelkaj jaroj, tiu ĉi fabriko faris pli ol 2,000 teknikajn renovigojn sinapogante sur siaj propraj fortoj, kaj nun la 70 pocentoj de ĝiaj ekipaĵoj estas fabrikitaj de ili mem.


## ĈIAM ANTAŬEN

Pro siaj novaj atingoj, la dua veldfabriko ofte estis laŭdita de la superaj instancoj kaj frataj unuoj, tamen, ili ne fieras pro tio kaj rigardas ĉiun el la venkoj kiel novan startpunkton por daŭra antaŭenmarŝo. Kiel la elstaran ekzemplon oni prenu ĝian kvarfojan produkton de karbonaj turoj, en kiuj la fabriko kvarfoje altigis sian laborefikon.

En la jaro 1970 kiam ili unuafoje decidis fabriki tian turon, neniu el ili havis sperton en tio. Ili lernis de frataj fabrikoj kaj faris ok ekipaĵojn kaj produktis la unuan karbonan turon nur per 2,900 laborhoroj, ĉ. duono de la tempo origine difinita. En la sekvinta jaro, la gvidantoj postulis ke ili produktu alian nombron da karbonaj turoj. La laboristoj lernis la instruon de Prezidanto Maŭ ke **"en la kampoj de la produkta batalo kaj scienca eksperimento, la homaro ĉiam konstante disvolviĝas kaj ankaŭ la naturo ĉiam konstante disvolviĝas"**, kaj decidis pluapaŝe mallongigi la laborhorojn. Ili resumis spertojn en prilaborado de ĉiu akcesoraĵo ĝis ĉiu laborprocedo kaj faris pli ol 20 teknikajn renovigojn, tiel ke la laborhoroj por produkti ĉiun produktaĵon mallongiĝis ĝis 1,500. En 1972, kiam la fabriko triafoje produktis karbonan turon, la



*Prilabori per memproduktita ekipaĵo*



*Oni prilaboras grandan maŝinparton per malgranda ekipaĵo.*

## Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko

Eldonita en la lingvoj araba, angla, franca, germana, japana kaj hispana.

18.5 × 13cm. Tole bindita kaj broŝurita.

## Unua Sesio de la Kvara Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko

(Dokumentoj)

La dokumentoj kolektitaj en la libro inkluzivas "Konstitucion de la Ĉina Popola Respubliko", "Raporton pri la Revizio de la Konstitucio" faritan de kamarado Ĝang Ĉunkiaŭ en la nomo de la Centra Komitato de KPĈ, "Raporton pri la Laboro de la Registaro" faritan de ĉefministro Ĝoŭ Enlaj en la nomo de la Ŝtata Konsilantaro, novaĵ-komunikon, anoncojn kaj rezolucion de la Kongreso.

La libro baldaŭ aperos en la lingvoj araba, angla, franca, germana, japana, hispana (bindita kaj broŝurita), bengala, birma, haŭsa, hindia, indonezia, itala, korea, laosa, persa, portugala, rumana, rusa, sŭahilia, sveda, tamila, taja, urdua, vjetnama kaj Esperanto (broŝurita)

18.5 × 13cm.

**Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio**
**Distribuata de GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio**

Bonvolu mendi ĉe la lokaj agento-librejoj aŭ rekte ĉe GUOZI SHUDIAN, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio


laboristoj mallongigis la laborhorojn ĝis 800 per la metodo samtempe produkti kelkajn turojn.

En 1973, kiam ili kvarafoje produktis karbonan turon, iuj opiniis, ke oni jam reformis ĉion renovigeblan, kaj la produkto atingis jam kulminon. Ĉu tio estis vera? Post studo de *Pri Kontraŭdiroj* kaj *Pri Praktiko* de Prezidanto Maŭ, la laboristoj ekkonis ke ĉio en la mondo estas moviĝanta kaj ŝanĝiĝanta; la progreseco de produkta nivelo estas nur relativa kaj ne havas absolutan kulminon, kio kreskigis al ili memfidon daŭre plialtigi produktan nivelon. Ili ĉiuj cerbumis kaj fine trovis novan teknologion en veldado de turkorpo, kiu mallongigis 100 laborhorojn po unu turo.

Dank' al la alta politika konscio, granda energio kaj kuraĝeco de la laboristoj en senĉesa kreado de novo, la produktado de la dua veldfabriko disvolviĝas per grandaj paŝoj.

# Laborista, Kamparana kaj Soldata Studentoj de la Pekina Universitato

Serioza studo pri marksismo




Studentoj de la filozofia fakultato komentarias *Lunju* (Vortoj de Konfucio).



Studentoj partoprenas en kunveno por reformi edukadon.

Instruisto kaj studento lernas unu de la alia.








Dum leciondonado



Studentoj de la biologia fakultato petas instruon de veterana kamparano.



Aktiva disvolvo de sportado




Partopreni en agrikultura laboro en kamparo

Instruistoj kaj studentoj de la fakultato de sociosciencoj faras enketadon.







Studentoj de la fizika fakultato faras laseran esploron.



Instruisto kaj studentoj de la arkeologia fakultato kunsidas kombinante la klasbatalon.



Fabriki elektronikan komputeron kun integra cirkvito



Por fari artan prezentadon al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

LAŬ TONG:

# Laborista Teoria Trupo

UN tagon en bela floranta printempo, la laboristoj kaj oficistoj de la Tiangin-a Fervoja Stacio atente aŭskultis en la kluba halo prelegon de reprezentantoj de la laborista teoria grupo, kiu formiĝis el tri maljunaj laboristoj, tri junaj laboristoj kaj tri gvidantaj kadroj. La prelegantoj-laboristoj rakontis la historion pri la bataloj inter konfucianismo kaj legalizismo dum pli ol du mil jaroj ekde la periodoj de la Printempo kaj Aŭtuno kaj de Militantaj Regnoj de Ĉinio. La prelegoj elstarigis la gravajn punktojn kun analizoj kaj kritikoj. La aŭskultintaj laboristoj ĝoje laŭdis la riĉan enhavon kaj profundajn analizojn de la prelegoj, dirante: "Bonaj estas la prelegoj! Estas plene montritaj la vidpunktoj de ni laboristoj!"

De la komenciĝo de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio tra la tuta lando, la vastaj fervojistaj amasoj de la stacio aktive partoprenis en la intensa revolucia batalo. La laboristoj diris: "Ĉiuj reakciaj regantoj de la pasintaj dinastioj de nia lando, Konfucio kaj liaj disĉiploj ĉiam rigardis nin laborulojn kiel bovojn kaj ĉevalojn, subpremis kaj trompis nin dum miloj da jaroj. Ĉifoje estas la tempo por ke ni serioze elfosu la radikon de ĉio ĉi tio."

## LEVIĜANTA TAJDO DE KRITIKO

Sub la gvidado de la partia komitato de la stacio, frue jam en septembro de 1973, la vastaj laborantoj de la nomita stacio disvolvis la kritikadon kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio. En la fino de printempo kaj la komenco de somero de 1974, ekaperis amatoraj teoriaj grupoj tiel multnombre kiel bambuidoj post printempa pluvo. En kelkaj mallongaj monatoj, laboristoj skribis pli ol 4,000 revoluciajn dazibaŭojn (artikoloj skribitaj grand-



*Veterana laboristo Hjue Kingkjuan prelegas la historion pri la batalo inter konfucianismo kaj legalizismo en militaj aferoj.*

litere kiel afiŝoj) por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion, okazigis pli ol 300 grandajn kaj malgrandajn kritikajn kunvenojn. Sur la murgazetoj de ĉiuj laborejoj kaj varstaplejoj de la stacio estas plenaj de materialoj skribitaj de laboristoj pri bataloj inter konfucianismo kaj legalizismo en la historio aŭ kritikoj pri la reakcia politika programo de Konfucio pri sinrego por restarigi la etiketon servanta por firmigi la sklavan sistemon, aŭ pri lia reakcia antaŭdestinisma koncepto ke "vivon kaj morton antaŭdestinas la sorto; riĉecon kaj noblecon decidas la Ĉielo", aŭ pri liaj reakciaj politikaj predikoj pri tio ke "kiuj laboras intelekte, devas regi; kiuj laboras fizike, devas esti regataj", pri "la superaj saĝuloj kaj malsuperaj stultuloj", "fariĝi ŝtatoficistoj post sukcesa sinklerigo", aŭ pri liaj reakciaj ideoj ke "la viro estas nobla kaj la virino pleba" k.a. Por klarigi la klasbatalojn en la historio de Ĉinio dum pli ol du mil jaroj, iuj laboristoj desegnis "sinoptikan tabelon de la ĉinaj historiaj epokoj", aliaj prezentis la "liniajn batalojn inter konfucianismo kaj legalizismo dum la periodoj de Printempo kaj Aŭtuno kaj de Militantaj Regnoj," triaj rakontis la "atakojn fare de kamparanaj insurekcioj en la historio kontraŭ la doktrinoj de Konfucio kaj Mencio" kaj kvaraj konigis famajn reprezentantojn de legalizismo el diversaj dinastioj. Laboristoj zorgis ŝtatan aferon kaj partoprenis en la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, tiel ke en la tuta stacio aperis plena vigleco tiel en revolucio kiel en produkto. La nova ideologio, novaj virtoj kaj novaj moroj de la proletaro ĉie prosperas kiel rododendroj en printempo.

*La teoria grupo de la Tiangin-a Fervoja Stacio diskutas kiel skribi la koncizan historion pri la batalo inter konfucianismo kaj legalizismo.*



## MILITIRO AL LA HISTORIO

En la komenco de la movado, iuj ne tre bone komprenis la rilatojn inter kritiko al Lin Biaŭ kaj tiu al Konfucio. Por kritiki Lin Biaŭ necesas kritiki Konfucion por elfosi lian ideologian radikon, kiu kondukis lin al restaŭro de kapitalismo. Sed Konfucio estis delonge starigita idolo de feŭdismo kaj ties fizionomio ankoraŭ restas nebula por multaj homoj, kiuj ne povas klare kompreni: Kia homo estis Konfucio? Kiaj estis liaj ideologio kaj politikaj opinioj? Al kiu klaso servis kaj utilis ĉio lia? Kial ĉiuj reakciaj regantaroj de diversaj dinastioj en la historio senescepte faris lin idolo kaj kultis lin kiel la plej grandan "saĝulon"? Kial lia reakcia penso ne estis plene faligita kaj kritike balaita en rubujon dum pli ol du mil jaroj? Kial la bienula klaso komence subtenis la legalizistojn kontraŭ konfucianismo kaj post ekposedo de la potenco iom post iom ekkultis konfucianismon kontraŭ legalizistoj? Kial ĉiuj ĉefoj de oportunismaj linioj en la historio de la Partio ĉiuj kultis Konfucion? Kial ankaŭ Lin Biaŭ petis helpon de la mortinta Konfucio kiam li provis intrige restaŭri kapitalismon? Kial ĉiuj reakciuloj en- kaj eksterlandaj ĉiuj energie kultas nun Konfucion?...


Ĉiuj tiuj problemoj, iuj apartenas al la kategorio de historio kaj aliaj al la fenomenoj de aktualaj klasbataloj, atendas ĝustan respondon. La partia komitato de la stacio profunde konsciis ke por vaste, profunde kaj longdaŭre disvolvi tiun movadon, necesas klare respondi tiujn problemojn.

Sed kiu respondu tiujn problemojn?

Dum diskutado, prezentiĝis la opinio, ke la antikva historio estas "malfacile enirebla tereno". Ĉu laboristoj kiel "malkleruloj" kapablas ĝin ataki? Ĉu ne estas pli bone inviti profesoron unue por doni al ni kelkajn lekciojn? En Tiangin ja ne mankis altaj lernejoj, kaj en la historia fakultato de la Universitato Nankaj eĉ laboris laborista propaganda taĉmento sendita de la stacio, sekve la afero estas facile solvebla. Sed, laboristoj rifuzis la proponon kaj diris: "Inviti profesoron kaj specialiston por lekcii estas iafoje necesa, sed iliaj lekcioj ne povas anstataŭi la studadon de la historio fare de ni laboristoj mem nek nian partoprenon en batalo de kritiko al Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj tiun de opono al kaj prevento de reviziismo!"

La vastaj laboristaj amasoj de la stacio esprimis al la partia komitato sian decidon: "Ĉar la historio estas kreita de laboruloj, kial do laboruloj ne povas skribi la historion aŭ lekcii pri ĝi? Kaj

*Ŝarĝado en la transportejo de la Suda Tiangin-a Fervoja Stacio.*



kiu rajtas studi la historion, se ne laboruloj? La laboruloj devas okupi tiun terenon."

Vizaĝe al la forto kaj decido montritaj de la vastaj laborantoj por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion, la partia komitato profunde studis la instrukciojn de Prezidanto Maŭ "**lerni iom da historio**" kaj "**utiligi la antikvajn en servo al la nuntempo**" kaj ekkonis ke mobilizi la amasojn por studi la historion kaj resumi la historiajn spertojn de bataloj inter konfucianismo kaj legalizismo estos tre granda helpo por kritiki la doktrinojn de Konfucio kaj Mencio kaj venki reviziismon. Tial la partia komitato decidis vaste mobilizi la amasojn por disvolvi atakon kaj longdaŭran kritikon kontraŭ la dekadenca ideologio — la doktrinoj de Konfucio kaj Mencio — kaj esplori la batalojn inter konfucianismo kaj legalizismo en la historio.

## TEORIA GRUPO DE "TRIFLANKA KOMBINIĜO"

Sekve de tio, la partia komitato unuflanke mobilizis ĉiujn laborantojn de la stacio serioze legi librojn kaj lerni Marksismon por majstri teorion kaj koni la malnovan Ĉinion por pli bone servi al la nova, aliflanke organizis laboristan teorian grupon konsistantan el naŭ personoj: sekretario de la partia komitato Liu Vanlu, vicsekretario Tian Ĝiŝun kaj konstanta komitatano Vang Bajkian, tri maljunaj laboristoj Hjue Kingkjuan, Du Juŝu kaj Fan Ĉenĝong, kaj tri junaj laboristoj Su Hangjing, Ni Baŭkin kaj Nie Ĝihia por esplori kaj verki historion — la historion pri la bataloj inter konfucianismo kaj legalizismo.

La tri maljunaj laboristoj de la teoria grupo ĉiuj laboris sur doko en la malnova Ĉinio, dum sia juneco estis multe subpremitaj kaj ekspluatitaj de kapitalistoj kaj feŭdismaj doktiranoj kaj multe spertis mizerecon kaj turmentadon. Su Hangjing kaj aliaj du junuloj estas de nova generacio de la nova Ĉinio kaj venis labori en la stacio post sia diplomiĝo el mezlernejo antaŭ du jaroj. Ne mankis malfaciloj por studi teorion kaj esplori kaj analizi la historiajn faktojn per stargrundo, vidpunkto kaj metodo de Marksismo al la naŭ personoj. Tamen ili havas firman decidon: Por ĝisfunde kritiki la doktrinojn de Konfucio kaj Mencio, venki reviziismon kaj preventi restaŭron de kapitalismo, ili nepre superos ĉiajn grandajn malfacilojn. La maljunaj laboristoj Hjue Kingkjuan kaj Fan Ĉenĝong diris: "Aserti ke ni laboristoj kiel 'kruduloj' ne kapablas esplori la historion, estas nenio alia ol la reakcia trompa tezo de Konfucio ke 'la superaj estas saĝaj kaj la malsuperaj stultaj'. Ne estas tia logiko, ke la reakciuloj rajtas arbitre fanfaroni por laŭdi Konfucion, sed ni ne rajtas restarigi la historian veron renversitan." Kun revolucia entuziasmo, la tri junuloj sin kuraĝigis unu al alia por firmigi sian decidon.

Tuj post fondiĝo de la grupo, ĝiaj membroj tagnokte konsultis la koncernan literaturon, pridiskutis alprenendajn vidpunktojn kaj komencis la verkadon. En tiuj tagoj Hjue Kingkjuan kaj Fan Ĉengĝong estis tiel absorbitaj de la taskoj, ke se sur la vojo al la hejmo ili ekpensis iun problemon, ili tuj haltis kaj notis ĝin en notlibron, kaj eĉ dum la manĝado kaj dormado ne ĉesigis cerbumadon. Plej

grandan malfacilon havis precipe maljuna Du Juŝu, kiu havas nur malaltan klerecon kaj estas suferanta altan sangpremon kaj facile atakata de kapturniĝo kaj vomemo. Sed li tage ne volis ripozi eĉ dum sunbrulanta tagmezo en varmega somero, kaj li ellitiĝis en la dua aŭ tria horo matene por konsulti materialojn kaj prepari prelegon.

## PRELEGADO DE LABORISTOJ SUR ESTRADO

Konsultinte historiajn verkojn kun kelkcentmiloj da ideografiaĵoj, studinte la artikolojn publikigitajn de ĵurnaloj kaj gazetoj pri bataloj inter konfucianismo kaj legalizismo, la laborista teoria grupo mem pretigis la unuan manuskripton de la verko *Simpla Historio pri Bataloj inter Konfucianismo kaj Legalizismo* kun pli ol sesdek mil ideografiaĵoj. Tio estas historia libro verkita de laboristoj post analizado kaj esplorado de historiaj faktoj laŭ la vidpunkto de Marksismo-Leninismo. Kun plena emocio la partia komitato aŭskultis la provlekciojn de la laboristoj, foje-refoje legis la lekciaĵon kaj profunde sentis ke en la amasoj kaŝiĝas senlima saĝeco kaj revolucia aktiveco por kritiki Lin Biaŭ kaj Konfucion.

La naskiĝo de *Simpla Historio pri Bataloj inter Konfucianismo kaj Legalizismo* ne nur vekis grandan entuziasmon de pli ol 2,000 laborantoj de la stacio, sed ankaŭ atenton de alilokaj laboristoj, kaj ili sinsekve invitis la teorian grupon por ke la lasta lekciu al ili. Tio certe ne estis rifuzebla por la teoria trupo, tiel ke dum 5-6 monatoj ekde majo de 1974, ili faris lekciojn pri la historio pri bataloj inter konfucianismo kaj legalizismo al pli ol tricent mil personoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ profesoroj kaj historiistoj. Tiuj opiniis ke tio estas nova iniciato en historio, kaj ke la laboristoj studas kaj analizas la historion laŭ marksisma vidpunkto ĝisfunde forlasinte la kutimon studi historion pro esploro de historio, liberigante la historion el la lernejaj klasĉambroj kaj el la libraro kaj kombinante historian studon kun la aktuala klasbatalo kaj linia batalo, tio estas granda kontribuo al la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio kaj precipe estas bona ekzemplo por ilia propra laboro.

La laboristoj de la stacio sentis tre grandan ĝojon kaj kuraĝigon pro tio kaj iuj prikantis la novaĵon jene:

*Laboristoj ekprelegas sur estrado,*
*rompas pordon de la universitato,*
*kun starpunkto klara kaj profunda sento*
*kondamnante bambufende Konfucion.*
*Por kondamni Lin Biaŭ necesas akuzi Kong-Meng*
*nepre ni reinversigu la inversigitan historion.*

## PLUE ANTAŬEN

El la esploro kaj prelegado de la historio pri bataloj inter konfucianismo kaj legalizismo de la antikvaj tempoj kaj profunda kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la vasta laboristaro de la stacio pli profunde komprenis: "Ju pli profunde la malnova sistemo estas kritikita, des pli malfacile ĝi restaŭrata." "Ju pli la ekspluatantoj ĉiumaniere protektas la malnovajn aferojn per sia tuta forto, des pli rapide la proletaro devas lertiĝi forpeli siajn klasajn malamikojn el ĉiuj kaŝitaj anguloj kaj elfosi ĉiujn iliajn radikojn de iliaj regantaj fortoj." Surbaze de profunda disvolvado de la movado de kritiko kontraŭ Lin Biaŭ kaj Konfucio, la laboristoj de la stacio diligente lernas revolucian teorion laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ **"Nia batalo bezonas Marksismon"**. El pli ol 2,000 laborantoj de la stacio pli ol 1,500 jam partoprenis en postlaboraj lernogrupoj por lerni teorion. Ankaŭ la nombro de tiuj, kiuj helpas laboristojn por lerni teorion, plimultiĝis de pli ol 140 homoj en la komenca tempo ĝis pli ol 350 homoj nun kaj samtempe aperadis multaj avangardaj personoj kaj kolektivoj kiuj lernas diligente kaj peneme. Ili lernis verkojn de Marks, Engels, Lenin kaj Prezidanto Maŭ kiel *Manifesto de Komunista Partio*, *Kritiko de Gothaer-programo*, *Kontraŭ-Duhring*, *Ludwig Feuerbach kaj la Fino de Klasika Germana Filozofio*, *Imperiismo kiel Plej Alta Etapo de Kapitalismo*, *Pri Praktiko*, *Pri Kontraŭdiro* kaj *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo*, kaj el tiuj verkoj elĉerpis senlimajn saĝon kaj forton por armi sian kapon. **"La esenco de Marksismo estas revolucia kaj kritika"**. Nur se oni posedas Marksismon pli bone, oni povas pli profunde kritiki la malnovan mondon kaj la malnovajn aferojn.

Unu laborista teoria trupo jam elkreskis en la Tiangin-a Fervoja Stacio.

En la jaro 1974, la produkto de la stacio akiris grandan venkon kaj finplenumis sian trafikan taskon antaŭdate je 32 tagoj. La serva laboro de la stacio plie ricevis unuaniman laŭdon de vastaj pasaĝeroj.

La revolucio disvolviĝas kaj la fervoja stacio de Tiangin antaŭenmarŝadas! La trajno de la epoko sub la stirado de la laborista klaso impete kuras sur la socialisma vojo.

GONG JING:

# Raporto pri la Nankina Pontego super Jangzi-rivero

LA Nankina Pontego brilas super Jangzi-rivero en matenruĝo. Ĝiaj naŭ gigantaj pilieroj majeste staras en la vasta rivero, kaj vagonaroj galopas tien ĉitien sur la pontego . . .


Dum la kvinjara funkciado, la pontego, kiun konstruis nia lando mem, spertis jam seriozajn provojn de atakoj de tajfunoj, akvego kaj tertremo. Oni tre volas scii, kia estas ĝia kvalito, kiel efikas la sennombraj novaj teknikaj renovigoj aplikitaj de pontokonstruintoj.

Antaŭ nelonge, esplora grupo konsistanta el specialistoj de niaj trafika, konstrua, scienca kaj eduka fakoj venis al la pontego por fari detalan plenampleksan ekzamenon. La konkludo diris: Al la bazo de la ĉefa parto de la pontego okazis nenia moviĝo nek subsinko, kaj la eltena povo al diversaj fortoj de la ŝtala trabaro konformas al postuloj de la projekto.

Tiel bona konkludo de la ekspertizo estis malfacile akirita. Frue jam en la komenco de ĝia konstruado, furioze ondegis kvazaŭ la riverakvo levita de fortaj ventoj la bataloj inter la du pensoj kaj la du linioj, ĉu sinapogi sur la propraj fortoj aŭ adori kaj blinde kredi al fremdlandaj teknikoj. Iuj ne kredis la krean kapablon de nia laboristaro, opiniante ke la pontego trans la nankina parto de Jangzi-rivero, kie la rivero estas larĝa kaj la torento estas rapida kun grandaj ondoj, estos nekonstruebla sen direktado de fremdlandaj specialistoj. Sed, laŭ la instrukcio **"sinapogi sur la propraj fortoj"** de Prezidanto Maŭ Zedong, la ĉina laboristaro fine sukcesis konstrui tiun pontegon per siaj propraj fortoj.

En la jaro 1972, la pontego alfrontis provon de torenta fluego. La furioza fluo forte atakis ĝin formante ĉe la pilieroj gigantajn kirlojn kaj levante kelkajn metrojn da teraĵo el la riverfundo

*La Nankina Pontego super Jangzi-rivero*



ĉirkaŭ la pilieroj. En tiu tempo, la laboristoj kaj teknikistoj kiuj estis taskitaj por protekti la pontegon, malfacile venis al ĉiu piliero per ŝipo. Post zorgema ekzameno ili trovis ke la pilieroj konstruitaj sur roka tavolo en riverfundo firme staras sen difekto. Ili konkludis: "La pilieroj estas sufiĉe fortikaj por rezisti kontraŭ la fluo kun akvoturnegoj, eĉ se la kirloj forpuŝus la tutan terajon ĉirkaŭ ili."

Nokte de la 17-a de junio, 1974, uragano de grado 12 atakis la pontegon, elradikigis arbojn ambaŭborde de Jangzi-rivero, levis ondojn pli ol sep metrojn altajn kaj rompis ĉiujn elektrajn liniojn ĉirkaŭ la pontego, tiel ke ĉirkaŭ ĝi regis plena mallumo. Tamen, la pontprotektaj laboristoj trovis ke trajnoj rapide galopis sur ĝi same kiel antaŭe.

Kvazaŭ fera giganto, la Nankina Pontego firme staras sur la ondeganta riverego interligante per siaj feraj brakoj la sudon kaj la nordon jam pli ol kvin jarojn. Nun, dekoj da vagonaroj plenŝarĝitaj de pasaĝeroj kaj konstruaj materialoj kaj miloj kaj miloj da aŭtoj trapasas la pontegon. Ĉiufoje, kiam Ju Jongŝeng, labormodelo kaj lokomotivostiristo de la Nankina Fervoja Administracio, stiras la vagonaron tra la pontego, li ĉiam sentas emociiĝon. Ĉar aperas al li la antaŭa bildo kiam la fervoja linio interrompis de la torenta rivero, tiel ke grandaj kvantoj da konstruaj materialoj kaj malpaciencaj pasaĝeroj amasigitaj ĉe la riverobordoj devas uzi longan tempon por sin prami trans la rivero. Poste kvankam ekfunkciis pramŝipo por transporti vagonaron, tamen la tempo bezonata por tio ankoraŭ superas du horojn ĉiufoje. Nun la trajno bezonas nur dekkelkajn minutojn por transpasi la riveron tra la pontego, sen ia maloportuno por la pasaĝeroj. Krome antaŭe ne eblis transporti iujn granddimensiajn varojn por la pramŝipo pro ĝia nesufiĉa granddimensia strukturo, sed nun la trajno ŝarĝita per tiaj varoj kiel grandaj elektrejaj ekipaĵoj, metalurgiaj maŝinoj produktitaj en Ŝanhajo kaj grandaj kaldronoj kaj transformatoroj fabrikitaj en la nordoriento povas libere pasi tra la pontego. Kaj kvindek pocentoj de la ekipaĵoj bezonataj por konstrui en Giangsu-provinco mezgrandan fer-ŝtalan kombinaton — la Nankinan Fer-ŝtalan Fabrikon, inter kiuj iuj pezas pli ol 30 tunojn kaj longas dudekkelkajn metrojn, estas senbare transportataj per grandaj kamionoj tra la pontego al la konstruejo.

*Pontoprotektantoj*



Dank' al la pontego, la materialaj interŝanĝoj kaj reciproka helpo inter industrio kaj agrikulturo ambaŭflanke de Jangzi-rivero estas ne plu bareblaj de plej grandaj ventoj kaj ondoj. En la unua tagdeko de aŭgusto 1974, la regiono de Hjuĝoŭ kaj Huajhe en la norda parto de Giangsu trafis pluvegon kaj inundon maloftajn en la historio, la stagnanta akvo grave minacis la digojn en la gubernio Sihong kelkcent kilometrojn fore de Nankino. Kvindek grandaj kamionoj portis nokte pli ol ducent diversajn pumpilojn tuj post la ricevo de ordono de la provinca instanco, rekte al Sihong tra la pontego. Kaj en la sekvinta tago ili jam ĝustatempe atingis la lokon kaj efike helpis la Sihong-anojn por batali kontraŭ la katastrofo kaj sekurigi riĉan rikolton. La ŝoforoj diris, ke sen la pontego, la kvindek kamionoj devus uzi unu aŭ du tagojn sole ĉe pramejo.

Antaŭ la konstruiĝo de la pontego, kuris ĉiutage nur kvar paroj da pasaĝeraj vagonaroj inter la ĉefurbo Pekino, Nordoriento kaj Nordokcidento unuflanke kaj Ŝanhajo kaj sudorientaj apudmaraj provincoj aliflanke, sed nun jam 13 paroj. Multe mallongiĝis ankaŭ la trafikaj distancoj inter la suda kaj norda partoj de Giangsu. Antaŭe per aŭtoj la provinca ĉefurbo Nankino povis atingi nur malmultajn guberniojn kaj urbojn, sed nun la plejparto de ili jam povas komunikiĝi kun Nankino aŭte. Nun ĉiutage sennombraj pasaĝeroj povas rekte veturi trans la larĝa rivero dank' al la pontego sen la penadoj forlasi la veturilon kun la pakaĵo prami sin trans la riverego por denove preni novan veturilon.

Rigardante tiun ĉi gigantan ŝtalan pontegon, oni ne povas ne admiri el korfundo nian laboristan klason, kiu elvolvis sian saĝon kaj forton por konstrui ĝin kun la spirito de sinapogo sur propraj fortoj.



*Guan Mejhua helpas junajn kontistinojn en la laboro.*

# *Kontistino en Montvilaĝo*

KOMPARTIANO Guan Mejhua estas kontistino de Kiaŭgia-brigado de Pantaŭ-komunumo, Pingdu-gubernio, Ŝandong-provinco. Dum la 21 jaroj de sia laboro ŝi ĉiam persistas en diligenta kaj ŝparema administrado de komunumo, tutkore kaj tutanime servas al la kolektivo kaj per tio ŝi ludis avangardan modelan rolon de kompartiano kaj ricevis laŭdadon de amasoj.

## PRENI SUR SIN PEZAN TASKON

En printempo de la jaro 1955, en Kiaŭgia-vilaĝo fondiĝis la unua agrikultura kooperativo. La 17-jara Guan Mejhua, kiu vizitis lernejon nur tri jarojn kaj duonon, estis elektita siatempe kiel kontistino de la agrikultura kooperativo. Tiam iuj maltrankviliĝis pro ŝia troa juneco, kaj ankaŭ ŝi mem timis ke ŝi vanigos esperon de la kooperativanoj kaj kaŭzos domaĝon al la kolektivo. Informiĝinte pri tio, sekretario de la partia filio Guan Hianfu diris al ŝi: "Mejhua, sub la gvido de la Kompartio ni liberiĝis. Kiu do faru tion se ne ni? Vi lernu kaj kuraĝe prenu sur sin la laboron, kaj la partia filio subtenas vin." Tio donis al ŝi grandan kuraĝigon. Kun ĝojeco kaj fiereco de mastro ŝi akceptis la taskon kaj samtempe esprimis al la partia filio sian decidon: "Mi nepre ne vanigos la esperon de la Partio kaj amasoj, kaj prenos sur min la taskon eĉ pli pezan."

Depost tio, tage ŝi kune kun kooperativanoj laboris sur kampo, kaj vespere ŝi lernis legoscion kaj kalkuladon de konto. Por kiel eble plej rapide mastrumi kalkuladon, ŝi forgesis dormi kaj preni manĝon. Ŝiaj okuloj ruĝiĝis kaj korpo malgrasiĝis, sed ŝi neniam plendis. Iufoje, profunda estis la nokto, ŝi tamen ankoraŭ okupiĝis pri lernado sub la kerosena lampo, kaj enlitiĝis nur post multfoja insistado de ŝia patrino. Sed, frumatene en la sekvinta tago, ŝi jam ellitiĝis antaŭ ol la patrino por lerni. Dank' al tio, Mejhua jam fariĝis bona kontistino en malpli ol unu jaro. La kooperativanoj ĉiuj laŭdis ŝian progreson.

En la jaro 1957, Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj ekblovis herezan venton por pogrande haki agrikulturajn kooperativojn kaj la bienuloj kaj kulakoj de la loko agitis kooperativanojn eliĝi el la kooperativo utiligante la ŝancon. Vizaĝe al la akra klasbatalo, sub la gvido de la partia filio, Guan Mejhua aktive protektis kolektivajn interesojn kaj batalis kontraŭ klasaj malamikoj. Tage ŝi kaj komunumanoj kune laboris, vespere ŝi propagandis al ili la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"Nur socialismo povas savi Ĉinion"** kaj refutis absurdaĵojn de la klasaj malamikoj per supereco de la kooperativo. La intrigo de la klasaj malamikoj estis frakasita, kaj la kooperativanoj de Kiaŭgia-vilaĝo venke antaŭenmarŝis sur la socialisma vojo kaj starigis poste la popolan komunumon.

## NE FORGESI ŜPAREMON

Serioze plenumante la instrukcion de Prezidanto Maŭ **"Diligenteco kaj ŝparemo devas esti praktikata en mastrumado de komunumoj"**, Mejhua ĉiam ekde la funkcio kiel kontistino klopodas por ne malŝpari eĉ unu cendon. En la komenco mankis al la kooperativa oficejo benkoj, ŝi do alportis la sian, kaj ankaŭ inkon ŝi mem preparis. Foje, ŝia sola plumo rompiĝis, ŝi do kunligis la rompitajn partojn per fadeno por daŭra uzo. Tiam, iu diris al ŝi: "Lasu tion, vi aĉetu unu novan!" Ŝi serioze respondis: "Aĉeti novan plumon estas facile, tio tamen perdigos stilon de laboremo kaj

ŝparemo." Tiamaniere Mejhua uzis la plumon sinsekve pli ol tri jarojn.

Poste, la brigado starigis flankokupan grupon, konstruis muelejon kaj brikotegolejon. Kaj Guan Mejhua ekfunkciis samtempe kiel kontistino pri flankokupo de la brigado. Ŝi klare sciis ke grandiĝas la entrepreno, multiĝas la elspezo, kaj neatentemo de kontisto kaŭzos grandan malŝparon. Tial en sia laboro ŝi ĉiam persistas ke oni ne aĉetu tion, kion oni povas fari per propraj manoj. La muelejo bezonis brosojn, ĉiu el kiuj kostas pli ol unu juanon. Por ŝpari la elspezon ŝi kolektis porkharegojn de domo al domo kaj mem faris la brosojn ĉiun per kvin cendoj. La komunumanoj laŭdis ŝin kiel "bonan administranton".

En muelejo, perdi iom da rizgrajnoj aŭ farunon pro neatentemo estas afero ofte okazanta. Iuj opiniis tion neevitebla kaj bagatela. Sed pri tio Guan Mejhua tute male pensas. Montrante la grajnojn falintajn sur la tero ŝi diris: "Ili estas akiritaj de komunumanoj per ŝvitoj!" Por kolekti la falintan grenon, ŝi speciale preparis sitelon por teni ĝin. Tiamaniere ŝi sume kolektis pli ol 3,000 kilogramojn da rizgrajnoj kaj faruno en dekkelkaj jaroj post sia funkcio kiel kontistino pri flankokupo de la brigado.

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio, la produkto de la brigado akiris pli grandan disvolviĝon. Ĝia komuna akumulita kapitalo plimultiĝis je 26-oblo kompare kun tiu de la kooperativo en komenco. Tiam iuj kadroj proponis konstrui grandan kunvenejon, kiu unuflanke favoros al kunvenado kaj aliflanke donos bonan impreson al fremduloj. Mejhua ne aprobis la opinion kaj diris: "Kompare kun la pasinteco, la kolektiva ekonomio disvolviĝis kaj la vivo de komunumanoj pliboniĝis. Sed, ni nepre ne devas forgesi la tradicion de penema luktado en malfaciloj kaj perdi la stilon de laboremo kaj ŝparemo pro riĉeco. Ni devas ĉie kaj ĉiam praktiki la principon difinitan de Prezidanto Maŭ **'Diligenteco kaj ŝparemo devas esti praktikata en mastrumado de komunumoj'!"** Poste, la partia filio akceptis ŝian opinion kaj aĉetis traktorojn anstataŭ konstrui la domon.

*Guan Mejhua kaj komunumano ŝprucigas insekticidon sur fruktarbojn.*



## INICIATE HELPI ALIAJN

Guan Mejhua ne nur bone faras sian laboron, sed ankaŭ iniciate helpas aliajn kontistojn kaj tenistojn de la brigada posedaĵo en politiko kaj laboro por ke ili bone administru la kolektivon.

Kontisto de la unua produktogrupo Gin Jugie estas klerulo kiu lertas en skribado kaj kalkulado. Sed, ŝi ofte intencis forlasi sian laboron, kiam ŝi renkontis malfacilojn. Guan Mejhua do kune kun ŝi lernis verkojn de Prezidanto Maŭ por veki ĉe ŝi la klasan konscion. Mejhua sincere diris al ŝi: "En la malnova socio, je eksonoro de la abako de bienuloj, ni malriĉaj kamparanoj devis almozpeti kaj elmigri. Nun, la komunumanoj konfidis al ni financan laboron, tio estas nia nerifuzebla devo. Ni nepre ne devas forlasi la laboron je malfaciloj!" Dank' al la helpado de Mejhua, malgranda Gin kreskigis sian memfidon venki malfacilojn kaj bone plenumis sian kontistan laboron.

Intelekta junulino Gin Mejhiang eklaboris kiel tenisto de kontantaĵo de flankokupa grupo en la brigado post sia diplomiĝo de mezlernejo. Komence, ŝi ofte eraris en kontado pro nelerteco. Guan Mejhua tiam persone instruis al ŝi kiel uzi abakon kaj kalkuli kontojn. Dank' al la fervora helpado de Mejhua, Mejhiang rapide ellernis sian oficon.

En praktika laboro, Mejhua aparte atentas influi kaj eduki gejunulojn per siaj modelaj agoj. En rikolta sezono de iu aŭtuno, flankokupa grupo de la brigado urĝe bezonis dizeloleon. Tiam iu juna kontisto proponis ke oni transportu ĝin per ĉevalĉaro de la brigado. Guan Mejhua tamen pensis: "Tio malhelpos la agrikulturan produkton, kiu nun streĉe iras en la brigado. Prefere ni mem transportu ĝin de la urbo per puŝĉaro. Tiel ŝi kaj la juna kontisto piediris pli ol 20 kilometrojn kaj plenumis taskon. Tia afero donis profundan edukon al la junulo.

# Ĉina Merkato en Prospero

Transporti legomojn al urbo





Freŝaj legomoj en nutraĵa vendejo sur Dagu-strato, Tiangin







Laborantoj de la aĉeta kaj proviza stacio por vivbezonajoj petas opiniojn de kamparanoj.

Freŝaj fruktoj en la Tiangin-a merkato.





En iu vendejo de kuiritaj manĝajoj de Ŝanhajo



En la Pekina Magazeno

En la Hidan-a Manĝaja Magazeno de Pekino





Kamela karavano de Interna Mongolio ofte portas vivbezonajojn al paŝtejo.



Komunumanoj de la Guĉeng-a Popolkomunumo, Ninghia, aĉetas siajn bezonajojn.



Peltaĵoj de Vuhu-a Peltoprilabora Fabriko trovas bonan akcepton en merkatoj en- kaj ekster-landaj.

Televidiloj en la Ŝanhaja Vendejo de Elektraj Instrumentoj





En la magazeno por nacimalplimultoj de Kunming, Junnan-provinco




## POSTLABORAJ UNIVERSITATOJ DE ŜANHAJAJ KULTIVEJOJ

Post la Granda Proleta Kultura Revolucio ĉiujare nombro da intelektaj junuloj de Ŝanhajo venis al la ŝtataj kultivejoj en la antaŭurbo por fiksloĝiĝi. Por helpi tiujn junulojn studi la revolucian teorion kaj posedi sciencajn kaj teknikajn sciojn, dek agrokultivejoj fondis respektive postlaboran lernejon de septembro de 1974, kiujn vizitas nun pli ol 3,000 gejunuloj. Observante la instruon de Prezidanto Maŭ **"La nova Ĉinio devas konsideri pri siaj junuloj kaj zorgi pri la kresko de la juna generacio"**, la partia komitato de diversaj kultivejoj donis grandan atenton al la lernejoj.

Heredante la tradicion de Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato, tiuj lernejoj persistas en ŝparema administrado. Iuj el ili prenis memfaradon de lernoĉambroj kiel unuan lecionon.

Lernoobjektoj de la universitatoj inkluzivas politikon, literaturan lingvon, kulturadon de agrikulturaj plantaĵoj, industrian bazon, akvoutiligon, brutobredadon, medicinon, revoluciajn artojn k.a. Pli ol 300 instruistoj de la lernejoj estas elektitaj el intelektaj junuloj, kadroj, veteranaj kamparanoj kaj teknikistoj de la kultivejoj. Ankaŭ Fudan-universitato de Ŝanhajo, la Ŝanhaja Instruista Universitato kaj aliaj altaj lernejoj helpis ilin en kulturado de instruistoj.

Ĉiuj bazaj produktaj unuoj de la kultivejoj starigis filiajn lernejojn, por ke la lernantoj vizitu lernejojn ĉeloke kaj apartigu sin nek de produktado nek de la amasoj.

## ĈAJU-GUBERNIO DE TIBETO SUKCESIS EN KULTURO DE TEO

Teo estas vivbezonaĵo de la tibeta popolo, tamen tie ne produktiĝis teo en la pasinteco. Antaŭ la Liberiĝo la lokanoj interŝanĝis 60 kilogramojn da greno kontraŭ nur 0.5 kilogramo da teo enportita de aliloke. Post la Liberiĝo, la Partio kaj ŝtato funkciigis tefarejojn en Siĉuan kaj Junnan najbare de Tibeto por provizi la liberigitajn servutulojn en Tibeto per teo, tio tamen bezonas multajn aŭtojn pro malfacila trafiko. En la jaro 1956, iu garnizonanta trupo de ĈPLA provkulturis teon en Ĉaju-gubernio sudokcidente de Tibeto kaj sukcesis en tio dank' al tiea varmeta klimato. Sed la kulturado ne povis esti disvastigita pro malhelpo de la reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. Post la Granda Proleta Kultura Revolucio la liberigitaj servutuloj de la gubernio komencis ĝenerale kulturi teon. Nun en multaj rivervaloj aperis teoĝardenoj unu post alia. Nombro da tibetanaj junuloj iris aliloken por lerni prilaboran teknikon kaj en 1973 ili unuafoje produktis la tebrikojn ŝatatajn de la tibetanoj. En 1974 la produktokvanto de teo plimultiĝis kaj jam povas kontentigi la bezonon de la lokanoj.

## GRANDA PORDFORMA GRUO ESTIS FABRIKITA

Por levi kapablon de ŝarĝado kaj malŝarĝado de niaj havenoj konforme al bezono de disvolviĝo de eksteraj komercoj, la Ponttraba Fabriko de Ŝanhajguan sukcese provfabrikis grandan levekipaĵon por ŝarĝado kaj malŝarĝado — pordforman gruon, kaj jam pogrande ĝin produktis. Nun la gruoj estas uzataj en pluraj havenoj.

La nomita gruo alta je 38.6 metroj kaj peza je 141 tunoj konsistas el pli ol dek mil pecoj. La ekzameno kaj provuzo de ĝi montris, ke ĝia kapableco estas pli bona ol tiu de samtipaj levmaŝinoj, kaj pro siaj facila movebleco, turnebleco kaj interŝanĝebleco per akcesoraĵoj, ĝi trovis varman akcepton de ŝarĝistoj.

# Unu Memorinda Pentraĵo

## — Pri la vizito kaj prezento en Alĝerio

JANG ĈUNHIA*

SUR la muro de mia ĉambro aldoniĝis nova pentraĵo, en kiu Ke Hiang, reprezentanto de la Partio en la pekin-opero *Rododendra Monto***, staras kun levita kapo, elstara brusto kaj pistolo en la mano.

La pentraĵo estas farita de juna belartisto Mofakih de Orana Teatro en Alĝerio. Kiam la Pekin-opera Trupo de Pekino partoprenis invitite en celebra aktivado de la 20-a datreveno de la alĝeria armita revolucio en novembro de 1974, li persone donacis ĝin al mi. Nun, kvankam mi jam revenis en hejmlandon, tamen rigardante la donacaĵon esprimantan profundan amikecon de la alĝeria popolo, mi kvazaŭ denove transpasis oceanojn kaj venis al la bela kaj riĉa Alĝerio. . .

La alĝerianoj havas gloran tradicion de batalo kontraŭ imperiismo kaj koloniismo. Dum pli ol cent jaroj la kolonia regado ne povis subigi ilin kaj ilia batala flamo pli kaj pli ardiĝis. En pli ol dek jaroj post la sendependiĝo, ili rapide faris post-



*Jang Ĉunhia (la unua de maldekstre) intime interparolas kun alĝeriaj literaturaj kaj artaj laborantoj.*



*La Pekina Pekin-opera Trupo de Ĉinio prezentas la ĉinan revolucian modernan pekin-operon* Rododendra Monto *en la Ŝtata Teatro de Alĝerio.*

militan konstruadon, kaj nun grandpaŝe antaŭen marŝas en konstruado de nova vivo, kion ni vidis en la tri urboj Alĝero, Annaba kaj Orano.

La vundo de la urbo estas kuracebla, sed tiu postlasita de la subpremado kaj ekspluatado de koloniismo en la koro de la alĝeria popolo estas neniam resanigebla. Jen estas la kaŭzo, kial la sortoj de la ĉina kaj alĝeria popoloj tiel strikte ligiĝas, kion mi sentis post la prezento de *Rododendra Monto*. La alĝeria popolo tre ŝatas ĉinan revolucian arton kaj multaj alĝeriaj amikoj, kiuj jam spektis la operon, ĉiuj laŭdis nian prezentadon. Iuj diris: "Tiom bona arto estas neimagebla." Aliaj laŭdis: "La sceneja arto estas tre bela, la prezentado tre brila kaj la ĉina luktarto tre mirinda." Mofakih ĉiam akompanis nin de kiam mi atingis Oranon. Li konkure prenis sur sin ĉiun laboron, ĉu imiti ĉinan kaligrafion streko post streko en pentrado de teatra afiŝo, ĉu fari dekoraciŝanĝon inter du scenoj. Tiel li ĉiutage laboris kune kun ni ĝis profunda nokto. Li diris: "Neniel sufiĉas por mi unufoje rigardi *Rododendran Monton*, kaj mi volas rigardi ĝin dekfoje eĉ dudekfoje. Sed, tre bedaŭrinde estas ke via restado ĉi tie estas tre mallonga kaj mi esperas, ke iam mi havos ŝancon viziti vian ĉefurbon kaj manpremi kun Prezidanto Maŭ." La pentraĵo, kiun li donacis al mi, estas farita de li kun profunda amikeco en tre mallonga tempo.

Mi volas doni apartan dankon al la du alĝeriaj aktoroj, kiuj faris samtempan interpretadon per la franca kaj araba lingvoj dum nia prezentado. Ili serioze studis la scenaron, ripete poluris la pensojn kaj sentojn de personoj en la teatraĵo kaj verŝis plej grandan fervoron al la interpreta laboro. La interpretistino por Ke Hiang diris al mi, ke ŝi tre ŝatas la heroon Ke Hiang kaj kunfandis sian senton kun la heroo en samtempa interpretado. Ŝi esperis ke iam ankaŭ ŝi havos ŝancon ludi la rolon de Ke Hiang. Lingvo estas ilo esprimanta homajn penson kaj senton, tamen ni kaj la alĝeria popolo ne povas kompreni unu la alian pro lingva baro. Sen bona teatro preparita de la alĝeriaj registaro kaj popolo kaj klopodoj de la du interpretaj aktoroj, nia prezentado ne povus tiel kortuŝi la alĝeriajn spektatorojn. Dank' al la fervora helpado de alĝeriaj amikoj nia prezentado akiris kompletan sukceson.

Je tio aperis en mia cerbo afero kiu ĉiam emocias min. Tio okazis en la urbo Annaba. En la teatro sidis iu ŝoforo. Kiam li aŭdis la demandon de Ke Hiang sur la scenejo: "Kiu iam servis ĉe tiranoj, tiu levu sian manon." Li nedeteneble stariĝis kaj levis sian manon laŭte respondante: "Mi tion faris!" En alia prezentado ankaŭ iu elektristo, kiu laboris sur flanka scenejo, silente levis sian manon. Tio klare montris, ke ambaŭ niaj popoloj iam havis komunan amaran pasintecon kaj fortan postulon por sinliberigo, tial niaj koroj estas tiel

strikte ligataj. Iu maljuna laboristo de la Annaba-a Teatro bone diris: "Mi estis partizano kaj turmentita de elektra punilo en malliberejo dum batalado kontraŭ koloniismo. Via prezento konigis al mi la pasintan vojon de la ĉina revolucio kaj ankaŭ rememorigis min pri la malfacilaj jaroj trapasitaj en naciliberiga batalo. Ĉinio kaj Alĝerio estas fidelaj amikoj. Via venko estas ankaŭ la nia."

Tio estas ne nur la laŭdo de alĝeria popolo al la ĉina revolucia arto, sed ankaŭ la prikanto al nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, kiu gvidis la ĉinan popolon en ekstreme malfacilaj bataloj, kaj la prikanto al lia revolucia literatura kaj arta linio. Ĝuste kiel iu amiko de eduka rondo de Alĝerio diris: "Via scenaro estas tre bona en arto, tamen ĝi servas ne al arto mem sed al politiko." En iu akcepta kunveno, koncize informiĝinte pri la krea procedo de *Rododendra Monto*, kelkaj dancistoj de Alĝerio diris: "Sukceson de la teatraĵo oni dankas al la ĝusta vojo."

La vizito kaj prezento kreskigis interkomprenon kaj amikecon. La alĝeria popolo estas gastama. Ĉie, ĉu en fabrikoj, botanika ĝardeno aŭ sur stratoj, alĝeriaj amikoj ĉiam ĝoje kriis: "Ĉinio! Ĉinio! Maŭ Zedong!" Nun antaŭ miaj okuloj refoje aperis figuroj de du knabinoj en Annaba. Tio okazis en la vespero, en kiu ni finis la lastan prezentadon en la urbo. Kiam mi demetis mian teatran veston, subite du knabinoj kuris al mi. Ili kun varmaj larmeroj brakumis min kaj kisis mian ŝminkitan vizaĝon. Ambaŭ ili ankoraŭ elpoŝigis multe da bombonoj por regali min kaj alterne kantis kantojn por mi. Laŭ iliaj gestoj mi komprenis ke la knabinoj tre ŝatas nian teatraĵon, kaj eĉ ne volas nian forveturon. La vortoj de Ali, elektroinĝeniero de Ŝtata Teatro de Alĝero, plej ĝuste esprimis nian koron. Li diris: "Alĝerio kaj Ĉinio ambaŭ apartenas al la tria mondo kaj estas amikoj kaj fratoj."

En la fino de novembro, kiam ni finis la viziton kaj prezenton en Alĝerio, ni multe bedaŭris pri la baldaŭa disiĝo kun entuziasmaj alĝeriaj amikoj. En la bela Alĝero maturiĝas la mandarinoj, kaj ĉarmas la pejzaĝo. Ĉu la skuantaj fruktoj en zefiro ne simbolas tion, ke la amikeco inter la ĉina kaj alĝeria popoloj akiris alian riĉan rikolton!

Kiam mi ĉesigis mian skribadon kaj rigardis malproksimen la noktan firmamenton plenan de trembrilaj steloj, mi kvazaŭ sentis ke alĝeriaj amikoj ankoraŭ restas ĉe mi, kaj en mia koro ondas amika ĝojo. Ĉiun kuraĝigon donitan de la amikoj al ni mi nepre transdonos al la ĉina popolo kaj firme tenos en mia koro. Tio kuraĝigos min pli firme antaŭenmarŝi laŭ la revolucia literatura kaj arta linio de Prezidanto Maŭ kaj pli diligente servi al la popolo.


---

**Ŝi estas ĉefa aktorino de* Rododendra Monto, *kiu ludis la rolon de Ke Hiang en la teatraĵo.*

***Pri la revolucia moderna pekin-opero* Rododendra Monto *oni legu EPĈ, n-ro 3, 1974.*



*Kanti pecojn el la ĉinaj revoluciaj modernaj pekin-operoj por alĝeriaj kamparanoj.*



Celebrado *ludata per muzikiloj klong put*

# Floro de Bataleca Arto

## — Pri la Liberiga Arta Trupo de Sudvjetnama Respubliko en Ĉinio

VU ZONG

*Plej belas flor' lotuso en folioj verdaj,*
*Kun blankpetaloj, filamentoj ore flavaj.*
*Sub obushajloj firme staras ĝi kaj skribas*
*Eposon kune kun la gerilanoj bravaj.*

Tio estas kantoteksto en la danco *Lotusoj de Dong Thap Muoi* prezentita de la Liberiga Arta Trupo de Sudvjetnama Respubliko. Granda emocio ĉiam kaptas nin, kiam ni ekmemoras la brilajn kantojn kaj dancojn prezentitajn de la sudvjetnamaj kunbatalantoj.

Kiam ili restis en Pekino, mi havis okazon detale informiĝi de arta direktanto de la trupo Pham Thai pri ilia batala vivo.

### KRESKADO EN BATALOJ

La nomita arta trupo naskiĝis kaj kreskis en la fajro de la naciliberiga batalo. De pli ol dek jaroj ĝi lasis siajn piedsignojn ĉie tra la tuta Suda Vjetnamio kaj ĝia kantado sonis super ĉiuj batalfrontoj. El membroj de la trupo iuj venis de la flamantaj bordoj de Mekongo, aliaj de diversaj lokoj regataj de la pupa reĝimo de Sajgono aŭ el la montregiono Tay Nguyen. La sama revolucia celo kaj nacia malamo strikte ilin unuigis. Per sia revolucia arto ili kuraĝigis la vjetnaman popolon al batalo kaj kontribuis al la venko de ĝia nacisava batalo kontraŭ la usona agreso.

La membroj de la trupo persiste verkis, provludis kaj prezentis batalante. Sub la malfacilaj kondiĉoj de intensa batalado ili sin nutris ofte per sovaĝaj legomoj, mem faris porprezentajn kostumojn kaj eĉ nudpiede marŝis kaj prezentis pro manko de ŝuoj. Por pli bone unuigi kaj eduki la popolon por bati la malamikon ili mem kreis kaj plenumis multajn prezentaĵojn. Ofte kiam ili provludis en kaverno, la muzikaj sonoj kaj tamburado intermiksiĝis kun tiuj de la kanonado kaj pafado ekstere. Okazis iafoje ke iuj aktoroj estis enterigitaj per teraĵoj disĵetitaj de la malamikaj bombadoj, tamen ili tuj daŭrigis provludadon elliberiginte sin. Alifoje ili faris prezentadon en la plejfronto kaj finludinte ili kune kun rigardantaro sin ĵetis en bataladon.

Aktoroj de la trupo estas kaj artistoj kaj batalantoj sur la fronto. Iufoje violonisto Nguyen Duc Loc ekstermis 9 malamikojn en batalo kontraŭ ilia balaa operacio. Brulvundite de napalmo aktorino Hopem daŭre persistis en batalo montrante sian obstinan volon kaj bravecon. Dancistino Nguyet Yen estis origine sekreta kuriero en Sajgono.

Post sia veno al la trupo ŝi ĉiam konservis sian originan bravecon ĉiam sturmi fronten dum batalado kaj kuraĝe ataki la malamikojn. Iuj eĉ oferis sian vivon por la sendependeco kaj libereco de la patrujo kaj liberiĝo de la popolo, skribante per sia freŝa sango kaj vivo heroajn himnojn.

## KANTOJ KAJ DANCOJ PLENAJ DE REVOLUCIA PATOSO

La popolo estas heroa kaj la kantoj kaj dancoj batalecaj. La batalantoj de la arta trupo kun politika entuziasmo kaj arta lerteco prezentis por la ĉinaj rigardantoj multajn programerojn, kiuj havas nacian karakteron kaj aŭdacajn novigojn kaj trovis varman aplaŭdon de la lastaj.

La danco *Lotusoj de Dong Thap Muoi* vivece esprimas la batalan vivon de la sudvjetnama popolo, kiu unuanime batas la agresantojn. Sur la scenejo oni vidas ke brava gerilanino atakas la malamikojn remante boaton sub ŝirmo de lotusoj. Ŝi jen antaŭenremis la boaton por pafi, jen malaperis inter la lotusoj. Kiam la gerilanino vundiĝis, la plenflorantaj lotusoj dense ŝin kaŝis simbole kiel la vastaj popolamasoj klopodas por savi sian karulinon. La vundiĝo de la gerilanino vekis ĝisostan malamon de la popolo kontraŭ la agresantoj, tiel ke ankoraŭ pli multaj homoj sin ĵetis en batalon. La danco per sia originala artisma projekto montras la gravan temon de unuiĝo kaj batalo de la sudvjetnamaj popolo kaj armeo kaj enkorpigas la grandan penson de popola milito.

La virina ĥoraĵo *Sur Printempa Vojo* prikantas la bravecon de knabinoj de Tay Nguyen, kiuj transportas grenon kaj municion al la fronto transgrimpante montojn kaj travadante riverojn por gajni sendependecon kaj liberecon. La bela kaj energia kantado kreas imagon al la spektatoroj, ke ili vidas antaŭ si kiel la knabinoj firmpaŝe marŝas en arbaro kaj montvalo tra densa branĉaro viŝante ŝviton de

*En Malnova Palaco*





*Kantodanco* Celebro pri Venko

sur la frunto kaj sopirante al triumfa morgaŭo. La kanto *Supren al Monto* kantita de kantistino To Lan Phuong kortuŝis tre intense. Ĝi prikantas virinon, kiu senhezite prenis sur sin la tutan ŝarĝon de la produktaj kaj hejmaj laboroj kaj subtenadon al la fronto por ke ŝia edzo povu iri al la fronto. La kanto vidigas la nevenkeblan volon kaj idealon de la sudvjetnama popolo. *Kanto Dediĉita al Onklo Ho* plenumita de Thanh Giang, kiu kun profunda revolucia sentimento esprimas senliman amon de diversnaciecaj popoloj de Suda Vjetnamio al Prezidanto Ho Chi Minh.

La vjetnama muzikilo nomata *klong put* estas malmulte konata de la mondo. Por ludi tiun instrumenton oni batas siajn manplatojn por sonigi la bambuajn tubojn per la kreita aerfluo. La muzikilo sonas en tono malakra kaj profunda. La *Celebrado* ludita de kvar artistinoj estas plena de vigleco kaj gajeco, montrante la ĝojon de venko en batalo. Spektante ilian senafektan kaj naturan prezentadon, ni des pli admiris la sudvjetnaman popolon: Ĝuste estas tiuj laboruloj vivantaj en montregiono kaj tiuj knabinoj ludantaj *klong put*, kiuj dehakis bambuojn kaj faris la muzikilojn, por ludi siajn ŝatatajn melodiojn prikantantajn la laboradon kaj vivon post laboro. Kaj kiam invadis la malamikoj, ili tuj sin ĵetis en batalon por solide regali la lastajn per bambuaj pikiloj, lancoj kaj sagoj.

Dum prezentado la vjetnamaj batalamikoj montris profundan amikecon de la vjetnama popolo al la ĉina. Ili kantis la ĉinajn kantojn *Vivu Prezidanto Maŭ! Sur la Ora Monto de Pekino* kaj *Ruĝa Stelo Lumigas Min al Batalo.* La fama majstro de solkorda instrumento Duc Nhuan ludis per ĝi *Sur la Ora Monto de Pekino*, kiu vekis fortan eĥon ĉe la spektantaro, ĉar la serena kaj intima sono tre similis al homa voĉo. Per sia profunda sentimento kaj bravura ludtekniko li faris la muzikan figuron ankoraŭ pli granda kaj sukriĉa, kaj tio estas sukcesa disvolviĝo de la ludarto de solkorda instrumento.

## PROFUNDA AMIKECO

La ĉina kaj vjetnama popoloj interligiĝas koro kun koro. Dum la vizitado, inter la batalamikoj de Ĉinio kaj Vjetnamio ofte aŭdiĝis la vortoj "ni

estas samfamilianoj" kaj "kamaradoj plus fratoj", kiuj esprimis ilian reciprokan amikecon.

La komunumanoj de la Ĉina-Vjetnama Amikeca Popolkomunumo ĝojplene kaj varme akceptis la malproksimajn batalamikojn. Ĉie en ĝi regis varma amika etoso. Oni rakontis al la gastoj pri siaj sukcesoj en revolucio kaj produktado akiritaj sub la kuraĝigo de venkoj de la vjetnama popolo en la nacisava batalo kontraŭ la usona agreso. La mastroj regalis la gastojn per siaj produktoj ternuksoj kaj fruktoj. Intime ili babilis inter si kiel samfamilianoj kaj amuziĝis, unuj al la aliaj, per prezento de artaj programeroj. La kanto *Mi Staras sub la Amikeca Pino*, kiun mem verkis la komunumanoj, vive esprimis la profundan amikecon kaj batalan unuiĝon inter la ĉina kaj vjetnama popoloj kaj estis varme laŭdata de la gastoj.



*Solo* Kanto Dediĉita al Onklo Ho

Kiam la arta trupo vizitis la Dancartan Lernejon sub Arta Universitato de "la Sepa de Majo", arta direktanto Pham Thai emocie rakontis pri paro da danc-ŝuoj: Antaŭ pli ol dek jaroj, li venis al tiu lernejo kaj starigis profundan amikecon kun tieaj instruistoj kaj lernantoj. Ĉe adiaŭo li ricevis de ili kiel donacaĵon paron da danc-ŝuoj, kiujn li kunportis ĉiam kun si tra ĉiuj batalkampoj de Suda Vjetnamio, ĉu en militmarŝado aŭ sub balaa operacio de la malamikoj, eĉ dum sieĝo de la malamikaj tankoj. Poste la ŝuoj difektiĝis sub bombado de la malamikoj, tamen li ankoraŭ ilin konservas ĉe si. Ankaŭ ĉifoje, li kunportis la ŝuojn al Pekino, ĉar li rigardas ilin ne kiel ordinarajn ŝuojn, sed kiel simbolon de batala amikeco inter la ĉina kaj vjetnama popoloj.

La profunda amikeco inter la ĉina kaj vjetnama popoloj spertis la provon en longtempa batalado. Por neniu detruebla ĝi ĉiam pli firmiĝas kaj disvolviĝas kaj daŭre fluas seninterrompe kiel la Riveroj Ruĝa kaj Jangzi.



*Ludado de solkorda instrumento* En Printempo de Celebro pri Venko



*Danco* Lotusoj de Dong Thap Muoi




### FABRIKETOJ FUNKCIIGATAJ DE KOMUNUMOJ EN FENGHUA

Dank' al unueca dispozicio, la socialisma industria konstruado de nia lando disvolviĝas ne nur en urboj sed ankaŭ en kamparo. Nun ĉiuj komunumoj de Fenghua-gubernio de Ĝegiang-provinco starigis siajn fabriketojn.

En tiu gubernio, krom 26 ŝtataj fabrikoj, troviĝas ankaŭ 148 fabrikoj funkciigataj de 31 popolkomunumoj inkluzive tiujn de maŝino, kemio, metalaĵo, ŝpinteksaĵo, elektra motoro kaj manĝaĵo kun sume pli ol 200 produktaj specoj.

Tiuj fabriketoj servantaj al agrikulturo uzas lokajn materialojn kaj provizas la lokanojn per la produktaĵoj. Ekzemple, la fabriko de agrikulturiloj de Giangkoŭ-komunumo produktas malgrandajn elektrajn motorojn, pumpilojn kaj furaĝkirlilojn kaj krome ankaŭ kulturas por siaj brigadoj maŝinmanipulantojn kaj elektristojn. La fiŝkapta brigado Honghi de Gieki-komunumo funkciigas elektrejon kaj riparejojn de maŝinoj kaj ŝipoj, kiuj mem riparas kaj konstruas motorajn velŝipojn, motorajn retlevilojn kaj detektilojn de fiŝaro, tiel ke efektiviĝis mekanikigo de fiŝkaptado. Jantoŭ-komunumo, kie abunde produktiĝas bambuoj, starigis ventumilan fabrikon kun jara produktokvanto de 350,000 ventumiloj.




# Ŝuj-nacio

ĜONG LAN

ŜUJ-NACIO havas sume pli ol 159,000 membrojn. 110,000 el ili loĝas en Sandu-a Ŝuj-nacia Aŭtonoma Gubernio en suda parto de Gujĝoŭ-provinco de nia lando, pli ol 48,000 en la gubernioj Duŝan kaj Libo, kaj la ceteraj en la nordokcidenta parto de Guanghi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono. En Sandu-gubernio troviĝas ankaŭ han-a, mjaŭ-a, buji-a, dung-a kaj jaŭ-a nacioj.

Sandu-a Ŝuj-nacia Aŭtonoma Gubernio estas bela kaj riĉa loko, kiu situas en la supra baseno de Duliu-rivero je 500-1,000 metroj alta super la marnivelo, sude de Miaŭling-montaro kaj dekliviĝas de la nordokcidento al la sudoriento. Tie varmeta estas klimato kun meznombra jara temperaturo de ĉ. 17°C, mallonga prujna tempo, kaj abunda pluvo, tial multe produktiĝas tie rizo, tritiko, kotono, maizo, kolzo, urtiko kaj batato. La lokaj fruktoj estas oranĝo, mandarino, pruno, persiko, piro kaj arbuto. Duliu-rivero abunde produktas karpojn, karasojn, nigrajn karpojn k.a. Tie kreskas cedro, pino, bambuo, aleŭrito, olea kamelio kaj diversaj valoraj drogherboj. Ĝiaj mineraloj inkluzivas feron, karbon, hidrargon, antimonon, sulfuron, aluminion kaj zinkon.

Ŝuj-nacia lingvo apartenas al Han-tibeta lingvofamilio. En la pasinteco ŝuj-oj iam havis sian antikvan skribadon, kiun oni nomis *Ŝujŝu*. En ĝi iuj estis ideografiaĵoj, kaj aliaj estis inverse skribitaj ĉin-ideografiaĵoj. Dum longa praktiko de vivo kaj produkto la ŝuj-a popolo kreis riĉan literaturon kaj arton, inter kiuj buŝa literaturo estas relative evolua kaj popolkanto okupas gravan lokon.

Ŝuj-nacio havas sian propran kalendaron, kiu difinis la okan monaton de la luna kalendaro kiel jarfinon kaj la naŭan kiel jarkomencon. *Duan* estas la plej granda festo de ŝuj-oj. En la festtago viroj kaj virinoj, maljunuloj kaj infanoj sin bele vestas por viziti siajn parencojn aŭ amikojn, kaj krome ankaŭ okazas konkurso de rajdado.


*Ŝuj-nacia junulino*

La nomon de ŝuj-nacio oni trovis plej frue en la literaturoj de Ming-dinastio. Laŭ la registro, ŝuj-oj jam eniris en fruan feŭdan socion en la fino de Song-dinastio kaj komenco de Juan-dinastio. En Ming-dinastio (1368-1662 p.K.) la socia ekonomio de ŝuj-nacia regiono havis rimarkindan disvolviĝon. Tiutempe, granda nombro da han-oj transloĝiĝis tien kaj alportis avangardajn teknikojn de produktado, kio akcelis disvolviĝon de tiea ekonomio kaj kulturo.

En la modernaj tempoj, la ŝuj-a popolo faris multajn revoluciajn batalojn, inter kiuj relative grandaj estis la leviĝo de kamparanoj en la mezo de la 19-a jarcento kaj la patriota movado de batalo kontraŭ imperiismo en la komenco de la 20-a jarcento. En 1885, sub la influo de la revolucio de Tajping-a Ĉiela Regno ŝujoj kune kun buji-a, dung-a kaj han-a popolanoj kondukis armitan batalon kontraŭ reakciaj regantoj de King-dinastio kaj persistis en ĝi 18 jarojn. Ili kune kun Tajping-a Armeo,

Nian-a Armeo kaj armeo de huj-a leviĝo formis uraganon kontraŭ reakciaj regantoj de King-dinastio. Tio plene montris la batalan spiriton de la ŝuj-a popolo.

En 1930, kiam la Sepa kaj Oka Armeoj de la Ĉina Laborista-Kamparana Ruĝa Armeo gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio trapasis ŝuj-an lokon, ili batalis kontraŭ lokaj tiranoj, distribuis grenon al malriĉaj kamparanoj, propagandis politikojn de la Partio kaj per tio semis revoluciajn semojn en tiu loko. En la jaro 1944, kiam la japanaj agresantoj invadis la sudan parton de Gujĝoŭ-provinco, kuomintangaj trupoj evakuiĝis paŝon post paŝo sen nenia rezisto. Tamen la heroaj popolanoj de ŝuj-nacio mem sin organizis kune kun alinaciaj popolanoj por batalo kaj donis fortan baton al la agresantoj. Poste la ŝuj-a popolo persistis en la batalado kontraŭ imperiismo kaj reakcia regado de Kuomintango ĝis la Liberiĝo.

En la fino de 1949, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj Prezidanto Maŭ, la suferplenaj ŝuj-oj akiris sian liberiĝon. De tiam malfermiĝis nova paĝo en historio de la ŝuj-a popolo. Post ekstermo de serioza plago — banditoj kaj bienuloj, la ŝuj-a popolo venke kondukis demokratian reformon kaj socialisman reformon. Laŭ la nacia politiko de la Partio, en januaro de 1957 fondiĝis Sandu-a Ŝuj-nacia Aŭtonoma Gubernio. En la jaro 1958, en ŝuj-nacia regiono efektiviĝis popola komunumigo.

Antaŭ la Liberiĝo, en la nomita regiono postrestis agrikultura produkto kun malalta produktokvanto. Post la Liberiĝo oni energie faris akvoutiligajn konstruadojn per siaj propraj fortoj kaj dank' al tio akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj. Post la Granda Proleta Kultura Revolucio ŝuj-oj en tiu regiono ĝenerale disvolvis amasan movadon de lerno de Daĝaj kaj aperis multaj avangardaj produktaj unuoj Daĝaj-tipaj ambaŭborde de la bela Duliu-rivero.

Post la Liberiĝo en la loko de ŝuj-nacio oni trovis abundan subteran riĉaĵon. Krom mineksplua-tado, oni starigis ankaŭ fabrikojn de muldado, agrikulturiloj, fajencaĵoj, sukero kaj kemia sterko en Sandu-gubernio kun nenia industria bazo en la pasinteco. En la malnova Ĉinio la gubernio estis izolita pro malfacila trafiko. Post la Liberiĝo, oni dragis Duliu-riveron kaj en ĝi lignoŝipoj povas navigi libere. Ankaŭ la trafikado de ŝoseo estas tre oportuna en la tuta gubernio. Precipe la venka malfermo al trafikado de Gujĝoŭ-Guanghi-a Fervojo kaj Hunan-Gujĝoŭ-a Fervojo multe faciligis interligiĝon de ŝuj-nacia regiono kun Pekino kaj aliaj lokoj de la tuta lando kaj ankaŭ akcelis tiean ekonomian disvolviĝon.

Antaŭ la Liberiĝo la kultura kaj eduka aferoj en ŝuj-nacia regiono estis tre postiĝinta, kaj troviĝis nur kelkaj lernejoj, kiujn vizitis plejparto de gefiloj de bienuloj. En la jaro 1964, la Sandu-a Ŝuj-nacia Aŭtonoma Gubernio jam havis 128 elementajn lernejojn. En 1973 ĉiu subgubernio havis sian mezlernejon kaj ĉiu brigado sian elementan lernejon. Kaj nemalmultaj gefiloj de laboristoj kaj kamparanoj vizitas altajn lernejojn. Antaŭ la Liberiĝo Sandu-gubernio havis nur unu kuracejon. Nun oni ne nur starigis hospitalojn en la gubernio kaj subgubernioj, sed ankaŭ kuracejojn en komunumoj kaj kuracstaciojn en brigadoj, kaj krom tio efektiviĝis koopera kuraca sistemo.


Dum la pasintaj 25 jaroj post la Liberiĝo granda ŝanĝiĝo okazis al ŝuj-nacia regiono. La vivo de la ŝuj-a popolo pliboniĝas jaron post jaro.



*Ŝuj-nacia studento (la unua de dekstre) de la Pekina Universitato*

# Pilko de Frateto

de **Guo Liang**



# Novaj Ĉinaj Esperantaj Eldonaĵoj:

## Geografio de Ĉinio (libronumero: 12-Es-1310)

En tiu ĉi libro estas kunmetitaj 14 artikoloj, kiuj koncize priskribas la ĝeneralan geografion, administrajn regionojn kaj nacimalplimultojn de Ĉinio, kaj ankaŭ ĝiajn topografion, montojn, klimaton, riverojn, lagojn, dezertojn kaj naturajn riĉfontojn. Kaj estas traktitaj ankaŭ kelkaj grandiozaj konstruaĵoj de antikva Ĉinio kaj la atingoj de nova Ĉinio pri naturtransformado.

116 p. 13×18.5 cm. kun fotoj kaj mapo £ 0.16 US$ 0.45

## Sovaĝa Herbaro (libronumero: 10-Es-30)

La nuna kolekto konsistas el 23 pecoj skribitaj dum 1924-1926. Ĝi estas unu el gravaj partoj de la verkaro de Sinjoro Lusin. En 1927 la aŭtoro eldonis ilin en libroformo, sub la titolo "Sovaĝa Herbaro".

Tiam la malnova Ĉinio troviĝis sub la reakcia regado de imperiismo kaj la feŭdaj fortoj. Kaj la aŭtoro firme oponis kaj batalis kontraŭ la tiamaj mallumaj fortoj, per la formo de poemoj en prozo kiel armilo same kiel per tiu de noveloj kaj eseoj.

Tra la poezia lingvo kaj vivfigurado en ĉiuj ĉi tiuj pecoj, la legantoj povas vidi la artajn karakterizaĵojn de liaj verkoj: vivplenan figuron, penetrecon, koncizecon kaj akrecon.

98 p. 12×18.5 cm. £ 0.11 US$ 0.30

## Ĉinaj Akrobataĵoj (libronumero: 85-GSEs-121)

La albumo konigas al la legantoj parton de la programeroj sur la ĉina akrobata scenejo kaj fragmentan vivon de aktoroj, kiel "leona danco" karakterizata de nacia stilo, kuraĝa kaj lerta "gimnastiko sur fiksita stango", sprita kaj gracia "salto tra ringoj", eleganta "ekvilibro kun bovloj surkape" kaj "ĵongla biciklado" plena de brava vigleco, kaj ilia prezentado por la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj k.a. Ĉiuj ĉi tiuj enkorpigas en si novajn brilojn de la akrobata arto de nia lando lastatempe.

120 p. kun 104 bildoj 18.2×20.8 cm. £ 0.53 US$ 1.45

## La Somera Palaco (libronumero: 87-GSaEs-205)

en 8 poŝtkartoj
£ 0.10 US$ 0.25

## Kantono kaj Junnan (libronumero: 87-GSaEs-206)

en 6 poŝtkartoj £ 0.10 US$ 0.25

**Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)**
**Bonvolu mendi ĉe la lokaj agento-librejoj aŭ ĉe la esperantistaj perantoj.**
**Oni ankaŭ povas mendi rekte ĉe la Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio.**

*Sur la Kovrilo:*

Laboristaj, kamparanaj kaj soldataj studentoj



EL POPOLA ĈINIO 中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**
**P.O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**Ĝenerala distribuanto: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 3 (200) 1975**

## Ĉefa Enhavo

Eduka revolucio en Pekina Universitato . . . . . . . . . . . . . .1

La eduka revolucio por mi . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .9

Post reveno al laborposteno . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .12

Ĝojiga afero el la Tibeta Altebenaĵo . . . . . . . . . . . . . . .15

Fabriko malgranda, antaŭenpaŝo granda . . . . . . . . . . . . .18

Laborista teoria trupo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .23

Raporto pri la Nankina Pontego super Jangzi-rivero . . . .27

Kontistino en montvilaĝo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .29

Unu memorinda pentraĵo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .32


Floro de bataleca arto . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .35

Ŝuj-nacio . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .40

# Ŝanhajguan-pasejo



Restajo de la Granda Muro
ĉe bordo de Bohaj-maro



Ŝanhajguan estas la orienta startpunkto de nia Granda Muro. La muro serpentumas de sur Janŝan-montaro suden ĝis la bordo de Bohaj-maro tra la pasejo.

Kiel unu el la distriktoj de la urbo Kinhuangdaŭ, Ŝanhajguan troviĝas en limo inter la provincoj Hebej kaj Liaŭning. La paseja urbo estas konstruita en 16-a jarcento kaj havas areon de pli ol kvar kvadrataj kilometroj.

La nuna Ŝanhajguan estas plena de prospereco de socialisma konstruado. La industrio kaj kultura, eduka kaj higiena aferoj rapide disvolviĝas, kaj la apuda haveno Kinhuangdaŭ jam fariĝis sinteza komerca haveno de Norda Ĉinio. Sur ĝia pitoreska marbordo troviĝas agrabla someruma loko Bejdajhe por laborantaj popolanoj.


*Sur la Dorskovrilo:*
La orienta urba pordego de Ŝanhajguan, unu el la gravaj konstruajoj de la Granda Muro, estas renovigita post la Liberiĝo.

Geknaboj de la elementa lernejo Nangie de Ŝanhajguan



Maro ĉe Kinhuangdaŭ





世界语《中国报道》一九七五年第三期（本刊代号：二——九一五）